

revuo

esperanto

majo 1964

57-a jaro

n-ro 702 (5)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



ESPERANTO

revuo internacia

- enhavo**
- 81 Novaj entreprenoj deciditaj (Estrara Kunsido)
 - 82 Kial la movado ne vivas en Rumanujo
 - 84 Ponto inter la kulturoj: tradukoj el Esperanto
 - 86 Imperia Palaco, Tokio (Isobe Yukiko)
 - 88 "La morto de Empu Sedah" (Winarsi/Liem)
 - 91 Novaj libroj
 - 92 Ricevitaj eldonaĵoj
Nekrologo
Esperanto en Radio
 - 93 CED
 - 94 49-a Universala Kongreso, Hago, 1964
 - 95 Mallongaj novaĵoj
 - 96 La Juna Vivo
 - 97 20-a IJK de TEJO, Amsterdam, 1964
Oficiala Informilo n-ro 368
 - 98 La internaciaj konkursoj
Letero
La poŝtmarkkolektado
Anoncetoj
- kovrilo**
- Sakuro, japana florarbo, en malnova ĝardeno (turisma artikolo p. 86).
- bildojn liveris**
- Kovrilo: LKK, Tokio
 - 83 A. L. Jokinen
 - 86 Japana Turista Asocio
 - 87 Same
 - 88 I. Njoman Sudarsana
 - 94 Harry Mulder

Fondinto: H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono: (010) 3 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMADRESO:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, Tel. (010) 5 66 45.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Jara abono (1964): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri kongresoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., vic-prezidanto, kaj aganta prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odýnca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario kaj estrarano pri informado, Kystvej 10, 2 th., Aabenraa, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

esperanto
majo
1964

Dum ankoraŭ la nederlanda printempo apenaŭ ekburĝonis, la kutima fruĵara kunsido de la Estraro de UEA en Rotterdam, de la 19-a ĝis la 23-a de marto, jam antaŭtraktis ne nur la agadon dum 1964 sed laŭ ĝiaj ĉefaj trajtoj ankaŭ tiun de la pli malproksima estonteco. Tutunue ĝi ricevis kun granda bedaŭro la demisian leteron de la Prezidanto de UEA, Profesoro Yagi, kiu pro sia nebona sanstato devis kontraŭvole demeti de si la respondecon de prezidanto. La Estraro tamen kun kontento eksciis, ke Prof. Yagi jam pli bone fartas, kaj tuj ekspedis telegramon por deziri al li rapidan saniĝon. Kiel aganta prezidanto funkcias vicprezidanto S-ro Holmes. Tiu ĉi ŝanĝo signifas, ke la sep ĉeestantaj estraranoj efektive konsistigis plenan Estraron. Krom ili, ĉeestis la diskutojn ankaŭ la Direktorino de la Centra Oficejo, la K.K.S., kaj la Redaktoro de "Esperanto", kaj ankoraŭ kelkaj aliaj personoj partoprenis en specifaj punktoj. Nur la formalaj laborkunsidoj ampleksis ĉ. 32 horojn.

El la Estrara Raporto por la jaro 1963-4, kiun la Estraro detale redaktis en sia marta kunsido, evidentiĝas, ke la kotizaltigo por 1964 estis absolute necesa, se la aktiveco de la Asocio ne malkresku. Malgraŭ la rekorda membronombro je la fino de 1963 la enspezoj el kotizoj ne tute kovris la bazajn elspezojn por administrado kaj asociaj organoj. Estas tial kontentige, ke la plej lastaj ciferoj tute ne montras malkreskon de la membraro rezulte de la kotizaltigo, kaj se tiu stato estos konfirmita je la fino de la nuna jaro, sendube estos eble ankoraŭ pli multigi la aktivaĵojn de la Asocio. Tiun esperon apogas ankaŭ la kapitala stato, kiu konsiderinde pliboniĝis dum la pasinta jaro. La Estraro invitas la membrojn daŭrigi sian libervolan kontribuadon precipe al la fondaĵoj Canuto (por helpo en nepagantaj landoj) kaj Azio-Afriko (por informa agado en tiuj kontinentoj).

Novaj eldonaĵoj aprobitaj

Superrigardinte la eldonan aktivecon de UEA ekde 1954, oni povis konstati, ke la plimulto de la eldonaĵoj dum tiu jardeko donis bonajn fruktojn. Interalie la plej nova verko eldonita, "La Naŭzo" de Sartre, montriĝas tre sukcesa. La Estraro nun akceptis proponon, eldoni dum 1964 du novelojn de la rusa verkisto M. J. Lermontov, okaze de la 150-jara datreveno de lia naskiĝo, kaj seeble ankaŭ la komedion "Sonĝo de someromeza nokto" de Shakespeare, okaze de ties 400-jara datreveno. Ĝi same decidis eldoni volumon de lingvaj kaj aliaj eseoj de Kolomano Kalocsay. Por helpi la instruadon en Azio, la Asocio jam eldonis vortareton. Esperanta-sinhalan, kaj baldaŭ sekvos simila lernilo Esperanta-bengala. Jam presata en Finnlando estas la plej nova volumo en la serio "Oriento-Okcidento" sub aŭspicio de UEA: la granda eposo de la suoma popolo "Kalevala". Ankaŭ al ĝi la Estraro decidis doni finanĉan apogon, ĉar estas tute

certe, ke ĝi povos riĉe kontribui al la kultura prestiĝo de la lingvo, kaj montriĝos tiurilate inda sekvento post la "Dia Komedio". La kultura revuo "Monda Kulturo", eldonata de UEA, troviĝas ankoraŭ en sia dujara provperiodo, kaj de la subteno, kiun ĝi ricevos de la abonantaro dum la nuna, garantiita jaro de aperado, dependos ĝia estonteco. Espereble la publiko komprenos ĝian unikan rolon kaj ebliĝos al ĝi firme sin establi en la venontaj jaroj.

Vicprezidanto S-ro Wensing raportis al la Estraro pri la intensaj preparlaboroj por la Instituto por Esperanto en Komercio kaj Industrio. Kvin landaj oficejoj estas jam starigitaj, komerca terminaro estas kompilata, kaj la Instituto komencis seriozajn kontaktojn kun diversaj industriaj entreprenoj por praktika utiligo de Esperanto. Ĉio ĉi tamen estas nur antaŭprepara agado ĝis la financa bazo de la Instituto estos plene garantiita.

Konferenco en Londono?

Donante sian plenan apogon al la Konsulta Komisiono pri Lernejoj, nove formita laŭ rekomendo de la Beograda Konferenco de Lernejoj, la Estraro aprobis la aperigon de trionjara "Lerneja Bulteno" en la kadro de la revuo "Esperanto", kiu helpu kunordigi la laboron sur tiu kampo, peru pedagogiajn konsilojn, ktp. La nova bulteno, kiu iros kiel represaĵo ankaŭ al individuaj lernejoj, estos pagata el la fondaĵo "Por vastigo de la agado". Oni plie decidis starigi specialan novan fondaĵon sub la titolo Fondaĵo Lernejoj (Helpo al Infanoj), per kiu estos eble faciligi al diverslandaj infanoj la partoprenon en internaciaj lernejaj renkontiĝoj, kaj doni alimaniere helpon. La Dua Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas Instruata okazos dum 1965 en Britujo, verŝajne en Londono, sub aŭspicio de UEA.

Pri la 49-a Universala Kongreso en Hago raportis la Konstanta Kongresa Sekretario. Ĝis nun aliĝis jam 1840 personoj, kio certigas sukcesan kongreson. Inter aliaj kulturaj kaj distraj programeroj, la Internacia Arta Teatro prezentos ses teatraĵojn: de Ionesco, Ĉeĥov, Sartre, Matković, Lorca kaj Kljaković. La Estraro konfirmis sian plenan apogon al tiu grava kaj laborema trupo. En la 17-a sesio de la Internacia Somera Universitato prelegos 8 universitatanoj el 6 landoj. La Estraro decidis prokrasti ĝis la Haga Kongreso decidon pri la kongresurbo por 1966.

Fine, sed plej grave, la Estraro unuanime decidis doni ĉiun eblan helpon al la nova projekto de Unuiĝintaj Nacioj: la "Jaro de Internacia Kunlaborado" en 1965. Interalie ĝi organizos amasan proponon fare de individuoj, eminentuloj kaj organizaĵoj, atentigante la Unuiĝintajn Naciojn pri la esenca rolo de la lingvo en la internaciaj rilatoj. Per tiu ĉi decido malfermiĝas nova perspektivo por la aktiviĝo de la membraro de UEA en fruktdona kaj eksteren-direktita laboro.

Kial la movado ne vivas en Rumanujo

**La progresoj
de la Internacia Lingvo
en tiu aŭ alia lando
povas dependi de ĝia geografia
situo, de la prestiĝo de
ĝia nacia lingvo, de la relativaj
gravecoj de naciismo kaj internaciismo
en ĝiaj politikaj rilatoj, aŭ,
kiel en la kazo de Rumanujo, de
arbitra sinteno de influhavaj individuoj.
Se temas pri geografio aŭ simila faktoro, evidente
malmulton povas ŝanĝi la klopodoj de la
Esperantistoj, sed atentigo pri la eraroj de individuaj
sintenoj kontraŭ Esperanto kaj taŭga informado en ŝlosilaj
medioj restos ĉiam prava taktiko por la Esperanto-movado.**

Estas ĝenerale konate, ke Rumanujo estas unu el la kelkaj landoj, kie ne ekzistas Esperanto-movado, kvankam ja ekzistas Esperantistoj. Malgraŭ partopreno de rumanoj en la kongreso en Sofio, jam de antaŭ la dua monda milito povis okazi nek landaj kongresoj nek eldonoj de libroj aŭ periodaĵoj. Kaj tiu situacio pludaŭras malgraŭ la refloro de la movado en Bulgarujo kaj Hungarujo, kiuj estas politike, geografie kaj ekonomie ĝiaj najbaroj.

Nun fine estas eble, lumigi almenaŭ parte la kaŭzojn de tiu stato. Inter aliaj kaŭzoj estas la opinio de unu lingvisto, akademiano Aleksandro Graur. Estas konate, ke oficialaj instancoj, ne konante problemon kiun ili devas solvi, ne kontentiĝas nur per petskriboj kaj raportoj de privataj personoj, sed preskaŭ ĉiam petas opinion de "spertuloj". Kiam temas pri lingvaj problemoj la plej sperta persono konsultebla en Rumanujo estas akademiano Aleksandro Graur. Liaj opinioj estas ĝenerale konsiderataj kiel nekontesteblaj. Same ankaŭ liaj opinioj pri la Internacia Lingvo. La esenco de tiuj liaj opinioj estas registrita en lia verko *Studii de lingvistica generala* aperinta en 1960 ĉe la Akademio de la Rumana Popola Respubliko. Kvankam estus tro enuige, pritrakti

detale la parton de la verko, kiu temas pri Esperanto, ni tamen prezentas kelkajn elstarantajn citaĵojn pro la instruo, kiun el ili povus ĉerpi la Esperantistoj.

1. Menciinte la relative malgrandan vortaron de Esperanto, Graur daŭrigas: "La homa pensado estas tro komplika por esti komplete esprimata per kelkaj centoj aŭ eĉ per kelkaj miloj da abstraktaj aŭ izolitaj signoj. Kutima lingvo havas, estas vere, nur kelkajn milojn da uzeblaj vortoj. Sed ĉiu el ili havas pli multajn signifojn laŭ la kunteksto en kiu ĝi troviĝas, laŭ la tono per kiu ĝi estas elparolata, laŭ la persono kiu elparolas ĝin aŭ kiu estas alparolita". El tio li konkludas: "La Esperantistoj, kiuj komencis traduki en sian artefaritan lingvon la grandajn verkojn de mondfamaj verkistoj, metis sin al unu el jenaj ekstremoj: por ne riski kripligi la originalon, ili estis devigitaj adopti grandan nombron da novaj vortoj, aŭ akcepti la turniĝojn kaj eĉ la idiotismojn de la aŭtoro. Kaj en unu kaj en la alia kazo, Esperanto ne plu estas simpla kaj facila lingvo kaj do prezentas neniun avantaĝon". Evidente, akademiano Graur ne kapablas imagi, ke la vortoj de Esperanto povas ricevi diversajn nuancojn laŭ sia kunteksto, sed li ŝajne supozas, ke ekzemple la vorto 'komunismo' havas precize saman sencon inter usonaj, kiel inter rusaj Esperantistoj, kaj eĉ, ke ili ĉiam elparolas ĝin per la sama tono! Nur persono, kiu tute ne konas la hodiaŭan Esperanton ("...neniam mi havis la okazon renkonti du homojn, kiuj interkompreniĝis per Esperanto...") povus aserti, ke ĝi "ne plu estas simpla kaj facila lingvo".

2. Same nur absolute neinformita persono povus surpaperigi jenan juvelon: "Komercesto el Irano povas skribi al iu de Santiago de Chile en Esperanto... por proponi al li la vendon de vagono kun petrolo... Sed ili ne povos priskribi unu al la alia siajn landojn". Jen vortoj eldonitaj de ŝtata akademio en la jaro 1960 p.K.

3. Esprimante sian principan malfidon al tio, kion li nomas "artefarita" lingvo, Graur klare malkovras sian pensmanieron: "Certe oni povas rekomponi per sinteza vojo naturajn elementojn, kaj se iuj sintezoj ne estas nun fareblaj, ni sukcesos fari ilin post monato aŭ post dek jaroj". Graur parolas ekzemple pri sintezita salo. "Sed kion oni proponas al ni ĉi tie, estas malkomponi pli multajn diversspecajn bestojn, kaj poste rekomponi novan beston el iliaj diversaj elementoj".

Apenaŭ valoras atentigi, ke argumentado per analogioj ne apartenas al la metodoj de la scienco, ĉar per analogioj oni povas "pruvi" ĉion ajn laŭbezzone — sed ĝuste la elekto de la analogio estas interesa. Ĝi montras, ke en la menso de Graur la lingvoj estas kompareblaj kun bestoj: do naturaj vivantaj estaĵoj. Kaj el tiu fundamenta eraro fontas lia tuta sinteno al la Internacia Lingvo, kiun li rigardas kiel ian kunkudritan beston el romano de H. G. Wells.

Responde (ĉar bedaŭrinde necesas daŭre respondi al tiaj opinioj), jen la vidpunkto de

Otto Jespersen,* lingvisto multe pli konata ol Aleksandro Graur: "Lingvoj ne estas organismoj, kaj ilia 'vivo' ne estas komparebla kun tiu de bestoj aŭ vegetaĵoj. Jam antaŭ 40 jaroj Schuchardt povis tre facile nuligi tiun ĉi kritikon, montrante kiom da elementoj en la t.n. naturaj lingvoj estas vere artefaritaj, t.e. rezulto de konsciaj klopodoj kaj konscia elektado, kaj tamen estas same vivkapablaj kiel ĉio alia".

Guste pri tiu ĉi temo prelegis alia fama lingvisto, Prof. Björn Collinder, honora patrono de UEA, kiam li parolis finlingve en Turku komenĉe de marto 1964. Laŭ Prof. Collinder, kiam en Hungarujo estis siatempe forigitaj ĉiuj fremdaj vortoj, la hungara lingvo ricevis ĉirkaŭ dek mil novajn tute artefaritajn vortojn. Li plue deklaris, ke "Artefaritaj vortoj ekzistas en Esperanto pli malmulte ol en la estona kaj hungara lingvoj", kaj konkludis: "Esperanto estas vivanta lingvo. Oni parolas ĝin en multegaj landoj en ĉiuj mondpartoj. En ĉiujaraj internaciaj kongresoj ĝi vivas fortan, pulsantan vivon. Dubantoj, kiuj ne kredas, ke Esperanto estas utiligebla, iru al Esperanto-kongreso kaj aŭskultu, kiam partoprenantoj interparolas ekzemple pri monaferoj — kaj dubantoj certe konstatos, ke la lingvo, per kiu oni tiel flue kaj lerte disputas, absolute apartenas al la grupo de la vivantaj lingvoj".

Se ni preterlasas la pure lingvistikajn eraĵojn de Aleksandro Graur (ekzemple, ke "hindeŭropaj lingvoj... escepte de la ekstrema oriento, estas la solaj lingvoj de granda ĉirkulado"), evidentiĝas du ĉefaj makuloj en lia pritrakto de Esperanto. Ne tre mirige, ili estas ĝuste tiuj samaj makuloj, kiuj karakterizis la verkon de Pierre Burney (vidu "Esperanto" 1962 p. 121) kaj la leteron de van Kuyk en la "Kuriero de Unesko" ("Esperanto" 1963, p. 87).

La unua makulo estas tio, ke lingvisto entute aŭdacas pritrakti en akademia verko temon, pri kiu li scias tre malmulte. Tiu ĉi fenomeno aperas tiel ofte inter profesoroj kaj akademianoj tra la tuta mondo, ke la esprimo "elkatedraj asertoj" fariĝis normala sinonimo de nesciencaj, nepruvitaj dogmaĵoj. Verŝajne la tento, eluzi sian altan oficon aŭ titolon por disvastigi privatajn antaŭjuĝojn kaj superstiĉojn, estas por multaj kleruloj nerezistebla.

La dua makulo estas la ankoraŭ ne mortinta kredo, ke lingvoj estas ia "natura", biologia aĵo, kaj sekve ne estas laŭvole ŝanĝeblaj aŭ kreeblaj. Kompreneble, ekzistas kelkaj similecoj inter diversaj aspektoj de la lingvo kaj de la bestoj. Estas ekzemple konate, ke la statistika distribuiĝo laŭ ofteco de la vortoj de iu lingvo estas tre simila laŭ formo al la distribuiĝo de la specioj de la bestoj laŭ ofteco, kaj sendube tiaj similecoj kondukis al la miskompreno. Sed finfine por la studo de lingvoj ekzistas lingvistikaj terminoj, kaj por la studo de bestoj ekzistas zoologiaj kaj biologiaj terminoj, kaj nur kiam iuj lingvistoj ĉesos intermiksi ilin, povos esti ordigitaj iliaj konfuzitaj pensoj.

* Otto Jespersen: "An International Language", Londono, 1928.

Profesoro Björn Collinder, honora patrono de UEA kaj emerita profesoro pri finn-ugraj lingvoj en la Universitato de Uppsala, Svedujo, prelegis en marto en Turku, Finnlando, post la fino de sia ĉirkaŭmonda vojaĝo. Ĉi tie ni citas kelkajn kernajn frazojn el lia parolado por ilustrati argumentojn kontraŭ alia lingvisto, Aleksandro Graur.



Restas tamen la fakto, ke la registaroj, la ministerioj de klerigo kaj ĉiuj instancoj, de kiuj dependas la oficiala pozicio de la Internacia Lingvo, efektive turnas sin laŭbezzone al ĝuste tiaj lingvistoj, kia estas akademiano Graur, kaj plej ofte akceptas sendiskute ties rekomendojn. Estas tial facile imageblaj la malfacilaĵoj, kiujn la rumanaj Esperantistoj renkontas ĉiupaŝe en siaj klopodoj por organiziĝo kaj oficiala rekono. Pro tio ni devas rigardi la lingvistojn, kaj la universitatojn kaj akademiojn, el kiuj ili disradias sian influon, kiel unu el la ŝlosilaj pozicioj por antaŭenigo de la movado. Guste nun, kiam estas preparata nova propono al Unuiĝintaj Nacioj okaze de la Jaro de Internacia Kunlaborado, la informagado en tiuj medioj ekhavas unuarangan gravecon.

Jam alvenis la tempo, kiam ĉiuj, kiuj parolas la Internacian Lingvon, forlasu sian komplekson de malsupereco. Venis la tempo, kiam ili postulu por Esperanto la saman respekton, kiun ĝuas la naciaj lingvoj, kaj ne plu toleru atakojn, kiajn neniu pensus direkti kontraŭ alia vivanta lingvo. Kaj ke Esperanto estas vivanta lingvo, tion elokvente atestas la fakto, ke malgraŭ Aleksandro Graur la lingvo pluvivas kaj pluvivos ankaŭ en Rumanujo.

Ponto inter la kulturoj

Novaj faktoj pri tradukado

el la Internacia Lingvo

Unu tre grava funkcio de la Internacia Lingvo, precipe en ĝia nuna stadio, estas en la rolo de punta lingvo en la tradukado. Jam en 1963, en la februara "Esperanto", p. 28, aperis listo, kompilita de S-ro D. B. Gregor, de la tradukoj faritaj pere de Esperanto de unu nacia lingvo al alia: ekzemple, la romano "Sango kaj sablo", tradukita el la hispana en Esperanton, kaj poste el Esperanto en la ĉinan. Tiu kompilaĵo vekis neatendite vastan eĥon, el kiu estis eble konsiderinde kompletigi kaj detaligi la informojn. Kvankam ĉiuj ricevitaĵoj korektoj kaj aldonoj estas zorge notitaj, ni presigas ĉi-sube nur tre koncize kelkajn el la pli interesaj notoj. Akceptu koran dankon ĉiuj, kiuj sendis korektojn, kiel ankaŭ la ordiginto, S-ro Gregor, kiu ankoraŭ daŭre kolektas informojn. Adreso: 27 Rushmere Road, NORTHAMPTON, Anglujo.

ESPERANTO KIEL PONTLINGVO

El la ĉeĥa: Aldonu al tiuj en la ĉinan: Du ĉinaj antologioj de ĉeĥa kaj slovaka prozo kaj poezio el la Ĉeĥoslovaka Antologio, trad. Kuai-Huan. Poemoj "Karboministo" kaj "Naryčka Magdonová" de Bezruč, kaj "La nekonata soldato" de Halas (ankaŭ el Ĉeĥ. Ant.) aperis ankaŭ (trad. Li Laojon) en poemkolekto "La Jugo" (246-paĝa libro enhavanta ĉinajn tradukojn de 61 poemoj esperantigitaj en 10 eŭropaj landoj). Aldonu al tiuj en la japanan: Poemo "Kanto de Silezio" de Bezruč, retrad. de M. Saki en "Granda Kolekto de la Tutmondaj Famaj Poemoj", Vol. 15 (1960) Noveloj "Malsato" de Langer, kaj "Pri Kamentubisto" de Wolker (el Ĉeĥ. Ant.)

El la pola: Ald. al tiuj en la ĉinan: Romanoj "Quo vadis?" de Sienkiewicz, kaj "La Faraono" de Prus. Novelo "La nova jaro" de Prus. Biografio "Adam Mickiewicz" de M. Jastrun, trad. de I. Dratwer kaj J. Zawada. Ald. en la francan: Biografio "D-ro Esperanto", de M. Ziolkowska, trad. de I. Dratwer kaj A. Ribot.

El la hungara: Aldonu al tiuj en la ĉinan: rakonto "Ruĝĉapeto", de Heltai, trad. de Bodó kaj Talento. Noveloj de Jokai, "La flava rozo", kaj "La edzino de l' falinto". Rakontoj de K. Mikszath, "Fantomo en Lublo", "La honesta intenco", "La ĉevalo, la ŝafido, kaj la leporo". Ald. en la bulgaran: Novelo, "Patri-no", de T. Deri.

Por kompreni la ĝeneralan bildon de la ponto-tradukado, necesas konsideri ĝin kune kun la rekta tradukado, kiu okazas sen helpo de Esperanto. Tion ebligas artikolo kaj tabeloj aperintaj en la "Kuriero de Unesko", februaro 1963. El tiu komparo montriĝas, ke iagrade Esperanto servis por kompensi la mankojn de la ceteraj tradukistoj. En la trafiko de okcidento al oriento, ekzemple, plej multe tradukataj sen Esperanto estas verkoj el la lingvoj ĝermanaj kaj latinidaj, dum per la Internacia Lingvo la oriento povis ekkoni la slavajn kaj aliajn literaturojn. Tamen, nek per Esperanto nek rekte ĝi tradukis el la sudamerika literaturo, teritorio ankoraŭ ekplugota. Ekrigardo al la diagramo sur la sekvanta paĝo krome montras, ke la okcidentaj Esperantistoj ankoraŭ preskaŭ tute malatentis la eblecojn, traduki orientan literaturon en eŭropajn lingvojn. Fakte nur el la ĉina aperis tradukoj pere de Esperanto. Kiu turnos sian tradukan talenton al la "Rakontoj de Oogai" aŭ al "Malsata ŝtono"?

La tradukoj faritaj el originalaj Esperantaj verkoj, entute preskaŭ cento, ĝis nun ampleksis ĉefe verkojn de Aisberg, Baghy, Forge, Lanti, Neergaard kaj Sekelj. Sed kiam venos la vico de Engholm aŭ Schwartz?

El la norvega: en la slovakon (ne la ĉeĥan). La tradukinto de "Kontiki" esperanten estas Brynildsen, slovakon Tvarožek, (2 eldonoj). La verko de Arnesen, (tiel!) estis tradukita de O. Ginz ĉeĥen el neniam publikigita traduko de J. Schjerve. La sama verko estis tamen tradukinta japanlingven de Zenmaru en 1928, la jaro mem de la tragedia ekspedicio de Nobile, kiun ĝi priskribas.

El la nederlanda: La verko de Dekker estas tradukita ankaŭ en la japanan, tiu de Luis-cius ankaŭ en la finnan.

Sekcio 9: Anstataŭ jugoslava legu "serbokroata", kaj aldonu: en la islandan: romano "Tragedio en la Universo", trad. Rotkvič kaj Ragnarsson.

Aldonu al tiuj el la germana en la ĉinan: Rakonto "Ruĝĉapeto", de Grimm, trad. Räuber kaj Talento.

El la japana: Aldonu — en la germ., litov., pol., bulg., hung., vjetnam.: Rakonto "Kun la kadavro de l' edzino", de O. Toyofumi, trad. T. Sudami.


En la germanan: "Ni ne povas silenti", trad. K. A. Metzkes. En la anglan kaj germanan: Rakonto "Belan pacon", de Yamaguti, trad. Isiguro kaj resp. S. Lancaster kaj K. Zimmer.

El la dana: Aldonu — en la mongolan: Fabeloj de Andersen, trad. Zamenhof kaj D-ro Rinčen.

Restas aldonotaj du donantaj lingvoj:

El la sveda: en la ĉeĥan, hungaran, japanan: Traktaĵeto, "La religiaj cirkonstancoj en

Kien iris la tradukoj ?



En la diagramo maldekstre vidiĝas la ĉefaj trajtoj de la traduka trafiko per Esperanto kiel ponto-lingvo. La eldonaĵoj, pri kiuj informoj estas ricevataj, estas dividitaj laŭ la lingvo-grupoj de la originalo kaj de la fina traduko. Tiel montriĝas unuavice la karaktero de la trafiko inter oriento kaj okcidento. El la malsupra parto de la diagramo la legantoj povas kompari la kvantojn de tradukoj faritaj el la diversaj grupoj de eŭropaj lingvoj, pere de Esperanto, en aziajn lingvojn. (Ĉiu kvadrato prezentas 3 tradukojn). La supro de la diagramo emfazas la relativan malabundon de tradukoj el aziaj en eŭropajn lingvojn. Iom surprizas, ke tradukoj interne de la lingvo-grupoj de Eŭropo-Ameriko (maldekstre) originas preskaŭ sole en la ĝermana grupo (ĉefe el dana, nederlanda, sveda kaj norvega lingvoj). Tradukoj el originalaj verkoj (Esperanto kiel fontlingvo) ne aperas en la diagramo.

Svedujo", de G. Furhammar. *En la bulgaran kaj francan* Traktaĵeto, "Vorto viva", de D. Hedegård.

En la japanan: Traktaĵeto, "La dia vojo al paco kaj ĝojo pri saviĝo", de H. Hubertsson. Rakonto, "Infanoj de Bethlehem", de S. Lagerlöf, trad. O. Frode kaj Isiga-Osamu (1938). *En la ĉeĥan kaj la japanan*: Traktaĵeto, Religia Vivo en Svedujo, de A. Alamo-Sandgren.

El la estona: en la japanan: Poemo "Ledvendisto Pontus", de Marie Under, trad. Hilda Dresen kaj K. Matuba (1963) ("la unua estona poemo en japana vesto").

ESPERANTO KIEL FONTLINGVO

"Fine mi komprenas la radion" de Aisberg estas tradukita en 22 lingvojn. Aldonendaj do al la jam menciitaj estas: angl., hisp., ned., norv., sved., (ĉi tiuj laŭ la *Enciklopedio*), pol., port. (brazila), ĉin., serbokroat., hebr. (el la franca kiel pontlingvo!) (rusa, laŭ iu fonto). La germana kaj la franca havis 11 eldonojn.

La franca kaj itala tradukoj de "Vivo de la plantoj" restas manuskriptaj. Publikiĝis tamen tradukoj en la portugala kaj kroata, do la sumo restas 7 lingvoj.

"La Laborista Esperantismo" de Lanti tradukiĝis en ses lingvojn, ĉar ankaŭ en la francan.

En la 5an lokon estus devinta veni "Nepalo malfermas la pordon", de T. Sekelj, tradukita en 4 lingvojn (angl., hisp., serbokroat., slov.). En 1963 ĝi estis presata en la japana. (Tradukis anglan F-ino M. Boulton).

Tradukitaj en 3 lingvojn: "Vivo de Zamen-

hof" de E. Privat (angl., ned., jap.); kaj "Printempo en la aŭtuno" de J. Baghy (Fr., ĉin., hung.). La ĉina tradukinto, Ba Ĝin, mem fama verkisto, poste verkis ĉine romaneton "Aŭtuno en la Printempo".

"Retoriko" de I. Lapenna devas bedaŭrinde esti forstrekita, ĉar io malhelpis presadon. Simile atendas presadon manuskriptoj de franca traduko de "Nepalo malfermas la pordon" (Sekelj/Ribot), sed eĉ nepresita esperantlingva verko povas esti fonto de nacilingvaj tradukoj, ekz. "Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo", de Sekelj, aperis libroforme en la turka kaj la ĉina kaj ses hindaj lingvoj).

Ankoraŭ 21 verkoj estas aldonendaj, nome: de Baghy, rakonto (?) "Heredaĵo", romanoj "Viktimoj" kaj "Nur Homo", poemo "Alarmo en 1945" (ĉiuj ĉinen); noveloj, "Unu el la kvar". "Tri kamaradoj", "Nur nature", kaj poemo "Preludo" (ĉiuj sveden); rakonto (?) "Melonkapo" (estonon). Krome en la svedan estas tradukita "Katoliko aŭ Protestanto" de Furhammer. Japanujo ricevis 3 tradukojn: "Tri-dek jarojn en la ora nordo" de Welzl (5 eldonoj!); "Esenco kaj estonteco de la ideo de L.I." de Zamenhof; "Historio de Esperanto" de Privat. Ankaŭ Francujo 3: "Kurioza gnomono" de Poljanski; "Pri novaj trigonometriaj sistemoj", de Dambrauskas; "Blua Kardo" (romano) de Sentis. S. Szathmári tradukis sian propran verkon "Vojaĝo al Kazohinio" en la hungaran. "Psikoanalizo" de Bovet tradukiĝis polen, kaj du romanoj de Bulhuis (pri filo kaj filino de malriĉa kvartalo) hebrean. Fine, Eroŝenko vidis ankaŭ sian novelon "Turo por fali" tradukita ĉinen.



*Gardoturo de
la Imperia
Palaco,
Tokio*

Imperia

Yukik

membro de LKI

Tokio, metropolo de Japanujo, nun estas la plej granda urbo en la mondo kun pli ol dek milionoj da loĝantoj. Ĝi estas la centro de administrado, ekonomio, industrio, kulturo kaj multaj aliaj aktivecoj. Retoj da diversspecaj transportaj servoj etendiĝas ĝis plej malproksimaj lokoj en la urbego. Se alilandaj vizitantoj starus ĉe iu angulo de la vivplena strato en Tokio, kredeble ili ne sentos fremdecon kaj ricevos preskaŭ saman impreson, kvazaŭ ili estus en iu ajn granda urbo en okcidentaj landoj. Ĉar plejparto de la malnovaj kvartaloj de Tokio estis detruita de sinsekvaj aertakoj dum la dua mondo-milito, ĝi renaskiĝis kiel tre moderna internacia urbo.

Sed restas kelkaj lokoj, kiuj ankoraŭ havas ĉarmon de malnova Japanujo, nome japanstilaj ĝardenoj, temploj kaj sanktejoj. Inter tiuj eble la plej ŝatata loko estas "Imperia Palaco", kiu situas en la centro de Tokio.

Ĝi havas ĉirkaŭ 250 akrojn da vasta spaco kun riĉe verda foliaro, kaj ĝin ĉirkaŭas remparoj kaj serio da fosajoj kun kelkaj pontoj por eniri.

La origino de la palaco datiĝas en 1456, kiam feŭdsinjoro nomata Dokan Ōta konstruis sian

kastelon en la nuna tereno de la palaco. En la fino de la 16a jarcento, Ieyasu Tokugawa, fondinto de la Tokugawa ŝoguna reĝimo, pli-grandigis kaj plifortikigis la kastelon kaj igis ĝin centro de sia politika administrado en 1603.

Iama kvieta loko nomata Edo apud la maro rapide kreskis al vigla urbo ĉirkaŭante tiun kastelon kaj ĝuis brilan prosperon dum ĉirkaŭ tricent jaroj sub la Tokugawa-ŝogunoj.

Kiam la Tokugawa ŝoguna registaro falis, kaj politika aŭtoritato estis transprenita de Imperiestro Meizi, la avo de la nuna imperiestro, en 1868 la imperia familio, kiu loĝis en Kioto pli ol mil jarojn ĝis tiam, transloĝiĝis al la Edo-Kastelo; kaj je tiu okazo la nomo de la urbo ŝanĝiĝis al Tokio. Tokio signifas orientan ĉefurbon: ĝi troviĝas proksimume 320 mejlojn for orienten de la antaŭa ĉefurbo Kioto.

La Tokugawa familio dum sia regado daŭre fortikigis la kastelon, kaj tial ĝi fariĝis la plej granda kaj fortika kastelo en Japanujo; sed en la fino de la Tokugawa epoko fajrego detruis ĝiajn ĉefajn konstruaĵojn. La palaco de la imperia familio estis konstruita post la Meizi Restarigo en la loko, kie antaŭe troviĝis

Modernaj
konstruaĵoj
kontraŭ la
Palaco

Palaco

Isobe

50-a UK, Tokio



Nisinomaru (okcidenta domo), sed ĝi estis bruligita pro aeratako en la 25a de majo, 1945. La imperia familio devis loĝi en la provizora palaco konstruita kiel rifuĝejo kontraŭ aeratako. Tamen antaŭ nelonge tiu palaco nomata Hukiage Gosyo estis pligrandigita kaj plibeligita kun ĉiuspecaj ekipaĵoj de moderna konveneco kaj utileco.

Du fojojn en la jaro, ĝenerala publiko estas permesata eniri en la terenon de la palaco tra la fame konata ponto, Nizyubasi (duobla ponto), por esprimi bondezirojn al la imperia familio, nome la 2an de januaro kaj la 29an de aprilo, la naskiĝtagon de la nuna imperiestro, Hirohito.

Ĉiujare en tiuj du tagoj, kelkdek miloj da bondezirantoj svarmas en la palaco. En aliaj tagoj la ĉefa pordego estas firme fermita, kaj vizitantoj iras al Nizyubasi por rigardi la antikvan pordegon de la feŭda epoko. En la proksimo de la ponto, ĉe la angulo de la remparo, staras gardturo kun blanka muro kaj spegulas sian belan figuron en la blua akvo de la fosaĵo. Rememoraĵo de malnova Japanujo.

De antaŭ ĉi tiu fronta parto de la palaco

etendiĝas vasta "Placo de Imperia Palaco". En malnova tempo troviĝis tie grandiozaj domoj de feŭdsinjoroj, kiuj estis devigitaj veni al Edo ĉiun duan jaron por montri sian lojalecon al ŝoguno. Nun restas nenia postsigno el tiu tempo: kun vasta verda razeno kaj multe da pinarboj, la placo havas miksitajn ĉarmon de oriento kaj okcidento.

Ekster la placo, trans la larĝa ŝoseo plena de aŭtomobiloj rapide kurantaj, elstaras altaj modernaj konstruaĵoj unu apud alia laŭlonge de la stratoj. Ili estas oficejoj, bankoj kaj ceteraj, kiuj formas la centron de industriaj kaj komercaj entreprenoj, kaj la kernon de nova Japanujo.

Estas interese, ke kiam ni staras apud Nizyubasi, fronte al la palaco, ni vidas rememoraĵojn de malnova Japanujo, kaj aliflanke, rigarde al la stratoj trans la placo kaj ŝoseo, ni vidas novan Japanujon, kiu vigle spiras. Kaj intermeze troviĝas la placo. Vere la ĉirkaŭaĵo de la Imperia Palaco mem estas unu el la trajtoj de granda Tokio, kie harmonie renkontiĝas oriento kaj okcidento.

Gloso: ŝoguno = feŭda estro.



"La morto de Empu Sedah" estas versajne la unua traduko el la indonezia lingvo, aperinta en la revuo "Esperanto". Temas pri fragmento el la malnova historio de Indonezio dum la regado de Prabu Djajabaja (1135-1157 p.K.) en la urbo Kediri en orienta Javo, kiam ekfloris la indonezia literaturo precipe pro la traduko el la sanskrita lingvo de la hinda eposo Mahabharata. Tiu ĉi novelo estas libere tradukita el verko de Winarsi. La ilustraĵon speciale desegnis por "Esperanto" juna balia artisto I. Njoman Sudarsana.

tradukis:

LIEM

Tjong

Hie

La morto de Empu¹⁾ Sedah

Historia noveleto

Li batis per la piedoj sur la plankon kaj samtempe li eligis krudan blasfemon. La mondo fariĝis turpa por li kaj la vivo senutila. Li tre deprimiĝis. Malkontenteco plenigis lian animon. Lia arda sopiro por ĝui la vivon kune kun la amatino dissplitiĝis. La koramatinon aliulo forprenis.

Antaŭ nelonge Empu Sedah estis ĝuinta la krepuskan sublimon sur la korto de sia loĝejo. Li enspiris la freŝan aeron dum la sunsubiro, post kiam li estis turmentinta sian cerbon por daŭrigi la komponadon de la granda verko Mahabarata, en kiu troviĝas la historio de Bratajuda. Li estis tre kontenta, ĉar liaj laboroj multe progresis, sed tiu kontenteco estis nur efemera, tiel efemera kiel la rapide blovanta vento. Ĉar la amatinon, Ambar, li vidis nun por la lasta fojo.

Tiu surpriza novaĵo venis el la lipoj de Ambar mem, kiu diris: "Kara mia, pardonu min miloble, sed mi venas al vi nun por la lasta fojo." Tiuj vortoj timide eligitaj elde ĉarma virina buŝo sonis kiel tondro en klara tago. "Kio? Por la lasta fojo?" Sedah ekkriis kun grandaj mirantaj okuloj, "Ne, ne povas esti!"

"Tamen tio estas la kruda vero," Ambar diris kaj larmoj eliris el ŝiaj okuloj, "Ambar amas nur unu viron kaj tiu estas Sedah, sed ve, mi estas devigata rompi la promeson. Mi fariĝos propraĵo de iu alia, mi ne povas eviti tion."

"Vi, sentaŭgulino," ree Empu Sedah ekkriis, "Mi scias, vi mezuras min, mi estas nur simpla literatoro, kiu eble ne povas provizi vin per riĉaĵoj."

Ambar ploris kaj la larmoj fluis abunde kvazaŭ per riveroj. Sed la koro de Sedah ne moliĝis pro tiu plorado, kontraŭe ĝi bolis pro kolero kaj tio videbliĝis el liaj okuloj, kiuj ruĝiĝis kaj preskaŭ elsaltis el la okulkavoj. Li jeĵuris la diablojn kaj malbenis Ambar: "Jes, mi erare elektis vin, perfidulino, via bela vizaĝo nur kovras vian falsan koron. Bone, iru do for de mi."

"Ne tiel koleru," Ambar respondis plorsingultante, "Aŭskultu min, mi estas devigata, ĉar la viro kiu posedos min, estas tre potenca en la lando de Daha."

"Fi! Kaj pro tio vi foriras de Sedah. Tre bone, bonege. Sekvu tiun viron. Li estas potenca? Vi scias, ke mi estas tre proksima al la reĝo."

Ambar levis morne la kapon kaj rigardis kun larmplenaj okuloj Sedah. Ŝi diris: "Ne miskomprenu min. La viro havas potencon super nia lando Daha. Lia decido estas leĝa."

"Ĉu li? La reĝo?"

Ambar klinis la kapon kaj en unu sekundo seniluziiga despero abrupte kaptis Empu Sedah. Li komprenis ĉion, Ambar, la amatino, ne kulpis. Li alproksimiĝis al ŝi kaj petis pardonon. Frida silento regis, nur la plorsingultoj de Ambar aŭdiĝis. Ambar unue rompis la silenton dirante: "Kredu min, karulo, mi amas vin, sed mi nenion povas fari, la reĝo estas ĉiopova."

Empu Sedah profunde suspiris, estis videble, ke lia animo forte baraktis. Li preskaŭ flustre respondis: "Kial ni ne forkuras kune, Ambar?"

Ambar terurigiĝis pro tiu respondo kaj diris: "Pardonu min, pensu pri miaj maljunaj gepatroj, miaj sensciaj gefratoj kaj mia tuta familio. La reĝo estas potenca super ni ĉiuj kaj li povus ekstermi ne nur mian, sed ankaŭ vian familion. Ne aŭdacu fari tion, ni estas feblaj en tiu ĉi afero."

☆

Nun Sedah klinis la kapon. La amoĝermo, kiun li vartis tiel longe, difektiĝis kvazaŭ pro inundo. La junulaj imagoj por ĝui la vivon flanke de koramatinino evidentiĝis nur delira sonĝo. Jes, la mondo estas plena je ĉagreno; plena je turmento. La potenculoj povas eniri Edenon por elvivi la vivon laŭ propra gusto. Empu Sedah disreviĝis. Prabu²⁾ Djajabaja, la reĝo, ne observis la ĝustecon. Laŭ Lia Majesta ordono li estis tradukanta la historion de Bratajuda entenitan en la granda verko Mahabarata. Li pasigis ĉiujn tempojn verkante tiun imponan historion kaj li faris ĉiun eblan streĉon por sukcesigi la malfacilan verkadon. Ĉio ĉi por la reĝo kaj majstro. Sed nun oni eĉ prede forprenis de li la amatinon. Ĉu en la tuta lando ne estis alia pli bela fraŭlino? Ĉu lia laboro, la tradukado de la majstra verko Mahabarata, estis vanta por la reĝolando de Daha? Lia koro doloris pro la agado de la reĝo. Li ne plu havis la fervoron por daŭrigi la laboron. Horojn kaj horojn li povis sidi pigrante.

Sed unu bonan tagon alvenis persona informiĝo de Prabu Djajabaja pri la reĝa tasko. Empu Sedah sur motivigitaj bazoj trankvile respondis, ke daŭrigo de la laboro estas tre malfacila. Prabu Djajabaja ne malmulte surpriziĝis pro tiu respondo; demandis li: "Ĉu konsumiĝas la provizo de lontar-folioj³⁾?"

²⁾ Prabu = reĝo. Prabu Djajabaja = reĝo Djajabaja, kiu reĝis super la hinduisma regno Daha en orienta Javo (12-a jarcento).

³⁾ lontar-folio = folio de la lontar-palmo (latine: *Borassus flabelliformis*), sur kiu oni en la antikva tempo skribis.

¹⁾ Empu = majstro aŭ fakulo, do Empu Sedah estas Majstro Sedah, fakulo en la literaturo.

La morto de Empu Sedah

Empu Sedah respondis: "Estas sufiĉe da lontar-folioj."

"Kio do kaŭzas la intermiton?"

"La verkado haltas pro nekomprenebla kaŭzo, Via Moŝto. Estas kvazaŭ al mi subite mankas necesa apogo. Al mi subite mankas imago-kapablo. Al mi subite mankas vortoj por pentri la ĉarmecon de la filinoj Madrakaj, kiuj akompanis la patron, Prabu Salja, ⁴⁾ kiel Senapati Astina ⁵⁾ al la batalfronto. Al mi subite mankas la kapableco ilustrati la sublimecon de tiuj filinoj."

La konfeso de Empu Sedah tre afliktis Prabu Djajabaja. Li ne povis klarigi al si, kial la verkisto subite ne kapablis priskribi belecon de virinoj. La reĝo ne volis montri sian mal-kontentecon kaj demandis: "Ĉu Panuluh ne povas helpi vin?"

"Mi timas, ke Panuluh, kiu estas pli juna ol mi, ne havas sufiĉas sperton por serioze pritrakti la temon. Li estas novico en la literaturo. La traduko de Mahabarata devas esti heredigita al niaj venontaj posteuloj, do ĝi devas esti ĉiusence perfekta."

Venis minuta silento. En la koro de Sedah furiozis amsentoj kaj projekto elmergiĝis el lia animo por efektiviĝi lian planon.

Post pripensado Prabu Djajabaja diris: "Vi estas prava, la deĉifrado de la originalo ne apartenas al la facilaj taskoj. En ĝi troviĝas multaj profundaj sencoj, abundas la filozofiaj esprimoj kaj aliaj gravaj formuloj, kiuj estas esencaj por la homa vivo. Ĉu vere vi ne povas daŭrigi la verkadon?"

"Via reĝa Moŝto, la problemo estas malfacila, tamen mi vidas eliron."

"Elparolu."

"La problemo kuŝas en tio, ke subite mankas al mi imagopovo por ĝuste ekspliki la ĉarmecon de la Madrakaj filinoj. Kiel mi priskribu ĝin? Kiel mi devas bildigi ekzemple la ĉielan allogecon de Banovati. Sed, via reĝa Moŝto, se mi havus apud mi belan filinon el la lando, tio certe povus multe, jes, multege helpi min. Pere de ŝi mi povus pli facile superi la malfacilaĵojn."

Prabu Djajabaja funde pripensis kaj poste diris kun iluminita vizaĝo: "Mi opinias, ke vi pravas. Vidante pimpan virinon tuj proksime de vi, vi certe povas per ĝustaj vortoj priskribi la sublimecon de la Madrakaj filinoj. Diru al mi, ĉu vi havas elekton?"

Sedah ne respondis, li rigardis antaŭ si en la malproksimecon. Prabu Djajabaja atendis kaj poste ripetis: "Diru al mi, ĉu vi havas elekton?"

"En la tuta lando Dahan ne estas trovebla virino, kiu povus funkcii kiel la ĝusta modelo, sed tamen laŭ mia opinio ekzistas unu."

"Kaj tiu estas?"

"Pardonon, via reĝa Moŝto, mi pardonon mi petegas, ŝi estas unu el viaj edzinoj."

"Kiu ŝi estas?"

"Indulgu min, via Majesto, estas Gusti Ambar ⁶⁾."

"Ho, Ambar, mia nova juna edzino," la reĝo ekkriis mirigite.

"Jes, estas ŝi, sole estas ŝi, kiu havas la ĝustajn proprecojn por helpi al mi ilustrati la belajn virinojn el la historio de Bratajuda. Vi scias: Banovati ne nur estas belega, sed ŝi estas ankaŭ brava heroino, elsenditino de la Pandavoj en la granda regno de Astina. Ŝi kombinas ĉarmecon kun nobeleco."

Prabu Djajabaja silentis, li ne povis tuj decidi. Ambar estis lia plej nova kaj plej juna edzino, kiun li multe amis. Estis tre malfacile por la reĝo fordoni ŝin eĉ nur por mallonga tempo. Sed se li rifuzus la peton de Sedah, la verkado de Bratajuda spertus gravan interrompon, oni ne sciis dum kiom da tempo. Prabu Djajabaja staris antaŭ dilemo.

La peto de Sedah tamen estis je la bono de la regno kaj al li oni certe povis konfidi Ambar. Ambar havas bonan, tre bonan reputacion. Ne estis kaŭzo por rifuzi la racian peton.

"Bone, Sedah, via peto estas plenumota. Mi konfidas Ambar al vi. Zorgu pri ŝi en via kvalito de reĝa subulo. Mi fidas, ke vi baldaŭ sukcesos fini la verkadon. La popolo de Dahan atendas la prezenton de la verko en sia propra lingvo. Plenumu vian devon, plenumu la deziron de la popolo. Baldaŭ Ambar alvenos."

☆

La decido de la reĝo tre ĝojigis Empu Sedah. Empu Sedah, kies koron kaptis arda amo al tiu sama virino, kiu antaŭe estis lia propra fianĉino. La fianĉino, kiu foriris kun la celo neniam plu reveni, sed kiun la sorto nun resendis al li. Lia koro forte batadis, kiam li revidis Ambar. Kaj ankaŭ ĉi ties koro vigle frapadis. Ambaŭ homoj denove trovis unu la alian, ambaŭ koroj renkontis unu la alian. Sed kune kun la koroj, kiuj renkontis unu la alian, ankaŭ la korpoj tuŝis unu la alian. Tute drominte en la amon Empu Sedah forgesis la komision de la reĝo. La amo ne sciis limojn. Ambar devis esti nur la modelo de la belega Banovati, edzino de Prabu Sujudana, la granda reĝo de la granda regno Astina. Sed por Sedah ŝi estis pli ol nura simpla modelo. Ŝi fordonis sin al Sedah. La verkado tro longe prokrastigis. Finfine la sekreto ne povis esti kaŝita. La reĝo prave furioziĝis. Empu Sedah misuzis la konfidon. Li plene komprenis, ke alia punkto ne ekzistas ol la ekzekuto. Al tiu punkto li submetiĝis, sed lia koro estis kontenta, ĉar li ekzalte ĝuis la realan amon kune kun sia kora-matino.

La morto de Empu Sedah malfruigis la finverkadon de la majstraĵo Mahabarata. Feliĉe la juna Panuluh povis daŭrigi la verkadon kaj estis li, kiu poste finis la tradukadon de la granda impona verko Mahabarata.

⁴⁾ Prabu Salja = reĝo Salja de Madraka en antikva Hindujo.

⁵⁾ Senapati Astina = militkomandanto de la antikva ĉefurbo Astina.

⁶⁾ Gusti = princino aŭ reĝino.

La obstino, rakontoj de NAKAZIMA Atusi. El la japana MIYAMOTO Masao. Eld. Librejo Pirato, Osaka, 1963. 95 p. 18 × 13 cm. Prezo: 3,80 gld.*

Laŭ la postparolo de la tradukinto, Atusi estas rigardata kiel unu ego de la japana moderna literaturo, se ne la zenito. Li studis japanan kaj ĉinan klasikajn literaturojn, sed ne neglektis ankaŭ la alilandajn, el kiuj — laŭ Miyamoto — ekzemple Franz Kafka estis unu el liaj favoratoj.

La libro entenas tri rakontojn laŭ malnov-ĉinaj temoj:

La luno super monto temas pri Li Ĝeng, kiu obstine celas fariĝi granda poeto, neglektante siajn homajn kvalitojn, kaj estas ŝanĝita al tigro. "Ĉiu homo senescepte estas dre-sisto de sovaĝbesto... en mia kazo la orgojla hontemo estis la sovaĝbesto, kaj ĉi tiu min difektis, afliktis la familion, vundis la amikojn, kaj finfine ŝanĝis mian eksteron jen ĉi tiel, konforme al mia interno" — klarigas Li Ĝeng — la tigro.

La lasta altaĵo, romano de Huu MAI. Fremd-lingva Eldonejo, Vjetnamio, 1963. 366 p. 19 × 13 cm., kun unu mapo. Prezo: 6,30 gld.*

Kvankam la verko portas la subtitolon "romano", ĝi estas io inter raporto, doku-mento, rakonto, kroniko kaj klopodo doni al la prezentitaj milit-okazaĵoj literaturan etoson. La verko komenciĝas per lirika priskribo de montdeklivoj sur kiuj odoras "Ban"-floroj kaj la lasta ĉapitro denove elvokas "Ban"-florojn kreskantajn sur la freŝaj tomboj.

Priskriboj de la teruraj milit-scenoj ne im-presas sufiĉe profunde, ĉar al la aŭtoro man-kis la arta forto. Por ke priskribo de unu batalo fariĝu literatura monumento estas be-zona plumo de unu Zola, Remarque, Mailer. El la verko de Huu Mai spiras ĉiupaĝe nur entuziasmo de kamparanoj kaj vilaĝanoj batalintaj por sia libereco. Liberecon kaj sen-dependecon neniuj regas. Pro tio ĉiu popolo havas aŭ havos sian Djen Bjen Fu, sed nur kelkaj tiaj batallokoj fariĝis mondkonataj artaj verkoj.

La lasta altaĵo tio ne estas, kvankam ĝi estas tradukita en kelkajn naciajn lingvojn. Ĝi vekas nur respekton kaj admiron por la heroa kamparana armeo, kiu ĉe tiu monteto elbatalis sian nacion sendependecon kontraŭ la armeo centoble pli bone armita.

Kvankam la deziro de la vjetnama eldonejo konigi al la internacia publiko la grandan militsukceson ĉe Djen Bjen Fu estas kom-prenebla, tamen, tiu verko, plej verŝajne, ne fariĝos ŝatata legaĵo por esperantistoj.

Emilija Lapenna (Zagreb)

La vivo de arkomajstro temas pri Gi Ĉang, kiu dum sia tuta vivo obstine klopodis, ĝis la plej alta nivelo ekregi la arkpafarton. Finfine li sukcesas pafi eĉ sen arko kaj sagoj, kaj la komenca celo de lia vivo fariĝas tiom mal-grava, ke li, vidante pafarkon, demandas, kio tio estas?

Li Ling, la tria rakonto, kaj per amplekso kaj per arto alte superas la du unuajn. Temas pri tri ĉinaj korteganoj en la dua jarcento a.K., sed tamen ĝi estas ĉiam aktuala. Ĝia arto rememorigas pli eble pri Hemingway ol pri Kafka: *La aĝulo kaj la maro* sen granda surprizo de la leganto povus aperi kiel la kvara rakonto en tiu interesa kaj pripensiga libro.

La lingvo de la traduko montras grandan evoluon de la tradukanto dum lia laboro. Ko-mence oni trovas multajn deviaĵojn de la klasika Esperanto, ĉefe en la sfero de seman-tiko, en la lastaj paĝoj tio ĉesadas. Entute oni povas diri, ke la traduko estas komprenebla kaj la libro certe leginda.

Ed. Felix, (Praha)

La du pupoj kaj aliaj rakontoj, de P. A. G. WRIGHT. Eld. SBET, Britujo, 1963. 23 p. 17 × 11 cm., ilustrita. Prezo: 0,75 gld.*

24-paĝa libreto de kvar simplaj rakontoj tre taŭgaj por enlerneja instruado. La aŭtoro retenas la intereson malgraŭ plena uzado de la lerniga artifiko de ofta ripetado. Klare presita per granda tipografio ĝi estas varme rekomendita por profesiaj instruistoj kiuj serĉas ne tro longan legolibron.


J. Gibson (Tasmanio)

Kvin jaroj de lizimetro-esplorado, de G. F. MAKKINK. Eld. ŝtata eldonejo "pudoc", Ne-derlandando, 1962. 241 p. 24 × 17 cm., kun foto-paĝoj kaj grafikaĵoj. Prezo: 14,50 gld.

Ĉi tiu hidrologia studo en la nederlanda lingvo enhavas 11-paĝan resumon en Esperanto (la apuda angla resumeo estas nur 4-paĝa). Krome ĉiuj bildoj kaj grafikaĵoj havas espe-rantlingvan klarigon. Sur la antaŭtitola paĝo la aŭtoro atentigas, ke anglan tekston povas legi 58% el ĉiuj sciencistoj, dum tekston en Esperanto povas legi 100%, post nur kelkhora studo.

Preĝo, S.O.S. kaj Sekureco, de Margareta MALMGREN. Eld. Esperanta Misio, Östansjö, Svedujo, 1963. 19 p. 19 × 12 cm. Prelegoj. Evangelia serio n-ro 10. Prezo: 1,50 gld.*

Resumo: En kvar mallongaj radioprelegoj la aŭtorino instigas al ofta preĝado anstataŭ nur escepta, kaj distingas tri funkciojn: preĝo por aliaj, preĝo por danki kaj por adori.



L' Espéranto vivant, de Pierre DELAIRE. Eld. la aŭtoro, Orléans, 1964. 6-a eld., 226 p. 21 × 14 cm., kartonbindita, il. Prezo: 11,25 gld. Kurso por franclingvanoj.*

Sesa eldono de la lernolibro de Pierre Delaire (antaŭe: *L' Espéranto en douze leçons*), *l' Espéranto vivant* prezentas sin "plena, enciklopedia kurso". Tia ĝi estas efektive. En ĉiu leciono: gramatika parto, tekstoj, tradukoj, ampleksaj lingvaj rimarkoj. Kiu digestis la tutan libron, tiu certe bone konas la lingvon.

Sed la "plibonigoj" enkondukitaj de Pierre Delaire en tiu nova eldono bedaŭrinde ne integriĝas glate al la baza verko. Pro ekonomiaj kaŭzoj, la plibonigoj estis aldonitaj (per paĝoj aparte numeritaj), dum ili evidente devus konduki al reverko de la libro. Konsekvenco: suplementaj klarigoj pri la parti-

cipoj aperas ĉe la fino, inter vortarspecimeno kaj gazetteltranĉaĵoj, teksto pri Zamenhof aperas trifoje, *La Espero* dufoje ktp. Pierre Delaire volis diri ĉion: li ofte diras tro.

El lingva vidpunkto la libro estas neriproĉinda. La malfacilaj temoj (gramatika karaktero de la radikoj, uzo de la participoj) estas perfekte prezentitaj.

Michel Duc Goninaz (Francujo)

La provo de fido, de Alvar BLOMGREN. El la sveda. Eld. Esperanta Misio, Örebro, 1964, Evangelia serio n-ro 9. 18 p. 15 × 11 cm., 3000 ekz.

Resumo: Bele presita prediko pri la biblia historio pri Abraham kaj Isaak. Laŭ la predikinto, tentoj kaj malsanoj kaj aliaj provoj de la homo estas senditaj de Dio por "konduki nin for de la egoismo".

ricevitaj eldonaĵoj

Distra koktelo por vojaĝantoj kaj aliaj. Eld. Aŭstria Esperanto-Junularo, Vieno, 1964. 128 p., 14 × 10 cm. Ofsetita antologieto rikoltita el diversaj Esperanto-revuoj.

Bonvenon al Oslo. Eld. Turisttrafika Asocio, Oslo. Liveras: N.E.L., Boks 942, Oslo, Norvegujo. Senpaga faldfolio, 10.000 ekz.

Meteoro, teatraĵo en 3 aktoj de Peter KARVAŠ. El la slovaka trad. Vladimír GAZDA. Eld. Diliza, Bratislava, 1963. 60 p. 20 × 14 cm. Multobligita kun presita kovrilo.

Uĉebnik po Esperanto (lernolibro de Esp.), de I. SARAFOV kaj S. HESAPĈIEV. Kvara eld., Ŝtata Eldonejo, Sofio, 1963. 154 p. 22 × 16 cm., bind. Eldonnombro 6080. 2,60 gld.

Resumoj kaj klarigoj el la jarlibro 1963 de la Instituto por biologia kaj kemia esploro de agrikulturaj plantoj, Wageningen, Ned. Trad. G. F. MAKKINK. 17 p. 21 × 17 cm., mult.

Esperanto. Eld. Rondo de Herboj, Tokio, 1963. 24 p. 18 × 13 cm., il. Japanlingva broŝuro.

Correlative Analysis. Eld. S. R. Dalton, 70 North Lane, Roundhay, LEEDS 8, Anglujo. Karta instruilo pri la korelativoj. Prezo 1 st. plus afranko.

Aktiveca mezuro de 14-karbone markita barikarbonato per scintilantaj ĝeloj, de L. GILLY kaj R. BISCI. 11 p. kun 4 grafikaĵoj; **Kvanta mezuro de gasoj el nuklefendiĝo per gamaspektrometrio**, de M. BLONDEL, A. SCHÜRENKÄMPER kaj A. M. TACHIS. 7 p. kun grafikaĵoj kaj tabeloj; ambaŭ dok. eld. Nuklea Studocentro de Grenoble, 1964. 28 × 22 cm., mult.

Intelektual, tecnico o comerciante, eld. Liceo de Esperanto, Madrid. Bone prezentita hispanlingva informilo.

Impresoj per Esperanta vojaĝo, de Doris WORCESTER kaj Eizo ITOO. **A.B.C. de Esperanto**, de Tacuo HUGIMOTO. Prononcinstruaj diskoj, 33¹/₃ r/m, 17 cm. Eld. Amo-Akademio, Kozoji, Japanujo, 1963.

Paroladoj kaj poemoj de L. L. Zamenhof. Eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio 1963. 156 p. 18 × 13 cm. Prezo: 4,— gld.*

nekrologo

ELISE JACOBS (1887-1964)

En Flensburg, Germanujo, forpasis post mallonga malsano Elise Jacobs, gvidintino de sennombraj kursoj en Germanujo, dum multaj jaroj delegitino de UEA.

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la aprilan numeron.

Radio Roma atentigas vin pri ŝanĝo en la uzataj ondlongoj: 50.34m. (5960 kcs), 41.24m. (7270 kcs), 31.33m. (9570 kcs). Programo por majo kaj junio: 1-V, La Unua de Majo; 5-V, Tra la literaturo; 8-V, Mondfama itala pedagogiistino: Maria Montessori; 12-V, Novaĵoj el Italujo; 15-V, La tago de bonvolo; 19-V, Italaj kanzonoj en Esperanto; 22-V, Malkovrindaj insuloj; 26-V, Leterkesto; 29-V, Italaj humanistoj: Angelo Poliziano; 2-VI, Tra la literaturo; 5-VI, La subakva sporto kaj la submara arkeologio; 9-VI, Novaĵoj el Italujo; 12-VI, Italaj kavalirecaj poemoj: "Morgante maggiore" de Luigi Pulci; 16-VI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 19-VI, Italaj turismaj

urboj: Tagliacozzo; 23-IV, Leterkesto; 26-VI, Epizodoj el la Dia Komedio: Francesca da Rimini; 30-VI, Kristana mondo. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja (marde kaj merkrede) kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella (vendrede). Raportoj pri aŭskultado, kritikoj, sugestoj estos bonvenaj. Skribu al Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma, Italujo.

Svisa Radio ankaŭ atentigas vin pri ŝanĝoj en la uzataj ondlongoj. Lunde kaj merkrede: 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 19.67m. (15255 kcs), 19.60m. (15305 kcs), 13.94m. (21520 kcs); ĵaude kaj vendrede: 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 25.61m. (11715 kcs), 19.60m. (15305 kcs).

Radio Praha. 28-V, Kio estas nova en niaj Esperanto-rondetoj; 25-VI, Vizito ĉe nacia artisto Martin Benka.



ESPERANTO EN LERNEJO, 1963—1964

Kvankam ne estas la intenco de CED, entrepreni detalan enketon pri la instruado de Esperanto en lernejoj dum la nuna jaro (nova enketo okazos en la jaro 1964-5), ĝi tamen daŭre sekvas la evoluon sur tiu kampo kaj daŭre ordigas ankaŭ spontane donitajn informojn. Ĝis la 1-a de aprilo alvenis informoj pri pliaj 26 lernejoj, ne statistikitaj en la pasintjara enketo (vidu "Esperanto", okt. 1963, p. 164), en kiuj lernas Esperanton minimume 458 lernantoj. Ne estas eble, en la kadro de la CED-rubriko publikigi detalojn pri tiuj lernejoj, sed sekvas mencio pri la plej gravaj aldonoj.

Krom en la 32 landoj de 1962-3, la Internacia Lingvo estas nun instruata ankaŭ en 4 novaj: en Ĉinujo en 5 universitatoj kaj lingvaj institutoj de Ĉengdu, Pekino kaj Ŝanhajo; en Islando en mezgrada lernejo de Reykjavík; en Suda Koreujo en 4 mezgradaj lernejoj de Taegu kun entute 195 gelernantoj; kaj en gimnazio de la insulo Bermudo. En la pasintjara statistiko (vidu la CED-dokumenton B/IV/9) montriĝis pluraj gravaj mankoj, i.a. la Universitatoj de Liverpool, Britujo, kie nun denove instruas Prof. Collinson, de Hamburgo (jam de 1950), de La Laguna, Hispanujo (vidu la raporton pri la plej nova sukceso en "Esperanto", aprilo 1964), de Budapeŝto kaj Szeged, Hungarujo, kaj de Amsterdam, Nederlando. En Nov-Zelando la aparte favora situacio vidiĝas en la aldonado de pluraj mezgradaj lernejoj de la Norda Insulo. Fine, en 1964 komenciĝis kurso en la "internacia lernejo" de la organizaĵo SHAPE en Saint-Germain-en-Laye, Francujo, kie lernas nombro da diversnaciaj infanoj.

Kiel oni vidas, kelkaj el la supraj aldonoj tute ne estas novaj. La bedaŭrinda fakto, ke la Esperanto-instruistoj en kelkaj eĉ tre gravaj lernejoj aŭ tute ne reagis al la pasintjara enketo, aŭ reagis kun granda malfruo, montras klare, ke ankoraŭ multaj instruistoj rigardas la aferon el strikte loka vidpunkto. Ili ne komprenas, ke kiu ajn loka sukceso en la lernejoj restas, el vidpunkto de la internacia movado, praktike senrezulta, se ĝi ne estas precize dokumentita por la agado ĉe alilandaj kaj internaciaj edukaj instancoj.

MALLONGAJ INFORMOJ

Kunlaboranto pri Bibliografio: S-ro E. P. Ockey, kiu jam dum multaj jaroj helpas al CED en diversaj manieroj, ĉefe per siaj elstaraj tradukoj de CED-dokumentoj, fariĝis nun kunlaboranto pri Bibliografio. En tiu funkcio li regule ellaboros la bibliografiajn informojn por la eldonaĵo de UNESKO "Index Translationum". Li jam komencis la laboron ankaŭ je la kompleta Bibliografio de Esperanto ekde 1887.


Lastatempaj prelegoj de kunlaborantoj de CED: F-ino Marjorie Boulton prelegis komence de aprilo en Reykjavík, Islando, en la tiea societo "Aŭroro". Prof. D-ro Ivo Lapenna faris du prelegojn en la Seminario okazinta en Grésillon, Francujo, komence de aprilo.

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,

Anglujo. Telefono ARNold 9081

CED



Kiel kreskis la instruado de Esperanto en lernejoj tra la tuta mondo dum la pasintaj 12 jaroj. Tiu ĉi grafikaĵo montras, ke la nombro de lernejoj ne nur daŭre altiĝas, sed ke la kresko ankaŭ plirapidiĝas. La grafikaĵo estas farita surbaze de la statistikoj de CED.

DONACOJ POR CED

	£	ŝ	p
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
Gesinjoroj Laurie, Britujo	2-	0-	0
S-ino R. Seddon, Britujo	2-	0-	0
Manly Esperanto-Klubo, Aŭstralujo	1-	10-	0
S-ro Lesoin, Francujo	3-	0	
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ro N. G. Nilsson, Svedujo	3-	12-	8
S-ro W. Reich, Usono	1-	16-	0
S-ro W. Bernhardt, Solomon-Insuloj	3-	12-	0
S-ro M. Gomez, Hispanujo	12-	0	
S-ro P. Nuez, Hispanujo	3-	4	
S-ro Nassif Isaak, Kuwait	30-	17-	1
S-ro W. Spaander, Nederlando	10-	0	
Gesinjoroj Holmes, Britujo	8-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando . . .	10-	5	

La stato je la 9-a de aprilo 1964 . . 70- 6- 6

CED tutkore dankas al ĉiuj, kiuj subtenas ĝian laboron per donacoj. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.



49-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Den Haag, 1—8 Aŭgusto 1964

Sub la Alta Protektado de Ŝia Moŝto Juliana,
Reĝino de Nederlando.
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

No. 9 Rotterdam, la 25-an de marto 1964

Tre Grave.

Pro kaŭzoj ekster la povo de la Loĝiga Servo la limdato por sendo de mendoj por loĝado en Den Haag dum la kongresa semajno estas plifruigita al la 15-a de majo 1964. Post tiu dato la Loĝiga Servo absolute ne plu povas prizorgi mendojn kaj la malfruigintoj devos mem aranĝi sian loĝadon.

Ni do varme konsilas al ĉiuj interesiĝintoj sendi sian mendon kiel eble plej baldaŭ, ĉiukaze antaŭ la menciita dato.

Senpagaj loĝejoj.

La Loĝiga Servo daŭre ricevas petojn por senpagaj loĝejoj en Den Haag. Ni devas informi ke bedaŭrinde ne ekzistas por la Loĝiga

Servo la ebleco plenumi tiujn petojn kaj sekve oni ne plu skribu tiusence.

I.S.U.

En la kadro de la Internacia Somera Universitato okazos prelegoj de Prof. D-ro Sin'itirō Kawamura, Prof. D-ro Ivo Lapenna, Prof. D-ro Oton Pancer, Prof. Inĝ. Vasil Peevski, Prof. Božidar Popović Prof. Juan Régulo Pérez, Prof. Gaston Waringhien, S-ro John Wells.

Statistiko (je 15-4-1964)

Alĝerio 2, Argentino 3, Aŭstralio 6, Aŭstrujo 18, Belgujo 28, Brazilo 2, Britujo 203, Bulgarujo 333, Centra Afrika Resp. 1, Ĉeĥoslovakujo 10, Cilio 1, Danlando 56, Finnlando 34, Francujo 221, Germanujo 155, Hindujo 2, Hispanujo 14, Hungarujo 92, Indonezio 1, Israelo 6, Italujo 78, Japanujo 11, Jugoslavio 82, Kuvajto 1, Luksemburgo 1, Madagaskaro 1, Malio 1, Monako 5, Nederlando 329, Norvegujo 24, Nov-Zelando 4, Pollando 140, Portugalujo 2, Sovetunio 2, Svedujo 90, Svisujo 26, Usono 20, Venezuelo 2. Entute 2007 el 38 landoj.

LKK Hago
fotita ĉe la
enirejo de
la moderna
kongresejo



LA KONGRESEJO

Kiel jam aliloke anoncite, "Op Gouden Wieken" estos la konstruaĵo, kie okazos ĉiuj kunvenoj de la 49-a Universala Kongreso de Esperanto, kun escepto de la inaŭguro, de la vesperaj aranĝoj kaj de la fermo.

Rigardante la moderne aranĝitajn salonojn, kie i.a. la tapiŝoj abundas, oni ne povas imagi ke origine la konstruaĵo estis monafinejo.

Estas el la enirejo de "Op Gouden Wieken"

ke la Loka Kongresa Komitato salutas vin kaj deziras al vi agrablan restadon en Den Haag.

La personoj de maldekstre: S-ro Isbrucker (prez.), S-ino Kervers (vic-prez.), S-ino Isbrucker (eksteraj rilatoj), S-ro Sertons (loĝiga servo), F-ino v. d. Berg (sekretariino), S-ro Pompilio (K.K.S.), S-ro HaverSchmidt (kasisto), S-ino Sertons (loĝiga servo), S-ino v. Dalsem (infana kongreseto), F-ino Otto (protokolistino).

LAŬFAKE

Geografio

● De 25 julio ĝis 1 aŭgusto okazos en Groningen, Nederlando, Geografia Semajno kun akceptoj, ekskursoj kaj prelegoj. Ĉion inkluziva kotizo: 500 steloj. Detale informas: S-ino N. C. Kuiterman, Johan de Wittstr. 103, Groningen.

Komerco

● Ankaŭ ĉijare la Internacia Specimenfoiro de Barcelona eldonis sian grandformatan afiŝon en Esperanto, en 15.000 ekz. Senpage dissendas: S-ro E. Gil, Apartado 875, Barcelona, Hispanujo.

● La Ĉina Ŝtata Korporacio de Importado kaj Eksportado de Maŝinoj aldonis esperantajn antaŭparolon kaj indokson al sia 533-era katalogo.

Korespondado

● La centro "Ora Spiko", kiu okupiĝas pri interligado de Esperanto-kursoj per korespondado, fariĝis fako de la Instruista Sekcio de Bulgara Esperanto-Asocio. Adreso: S-ro P. Arnaudov, N. Popkonstantinov 38, Pazarĝik.

● Okaze de la Novjorka Monda Foiro de 1964-5, elektrona komputilo elektos por vi korespondantojn laŭ lingvo, aĝo, interesigoj kaj loko. Petu aliĝilon de Parker Pen Co., Penfriend Program, Janesville, Wisconsin, Usono.

Ornitologio

● S-ro W. De Smet, Hendrik Meyslaan 9, Deurne, Belgujo, daŭrigas ankaŭ ĉijare sian enketon pri la migrado de kukoloj (legu en "Esp." 1963 p. 73) kaj petas kunlaboron el ĉiuj eŭropaj landoj. Rezultoj verŝajne aperos en 1964.

Studentoj

● Post la sukcesa STELO-semajno en Primoŝten, 1963, okazos en julio 1964 dua STELO-semajno en pola urbeto Ciechocinek apud Toruń. Inf.: R. Skaliński, Szczytna 6 m 3, Toruń.

LAŬLANDE

Aŭstralio

● En la dua oficiala ŝtatekzameno pri Esperanto en Tasmanio, decembre 1963, sukcesis naŭ gejunuloj, kontraŭ tri en decembro 1962.

● En Redcliffe apud Brisbane estas inaŭgurata la unua Esperanto-strato de tiu kontinento.

Britujo

● En 1964 almenaŭ 12 elementaj lernejoj instruas la lingvon (pasintjare nur 1-2).

Francujo

● La Kulturaj kaj Turismaj Internaciaj Ferioj en Grésillon (2-19 julio) inkluzivos prelegojn: "Evoluo de arto de post la Renesanco", "Kiamaniere resti juna?", "Kun la Saharo-nomadoj" kaj "Anĵuo en la franca vivo". Informas: Kastelo Grésillon, Baugé (M & L).

Hindujo

● Paralele kun sia parola instruado, S-ino M. Haudebine, laboranta en Hindujo nome de APO (Agado en Proksima Oriento), ekfunkciigas korespondan kurson bazitan sur la konata lernolibro de Szilágyi, sed adaptitan al hindaj cirkonstancoj. La kurso multe helpas por etendi ŝian agadon trans la subkontinento.

Hispanujo

● Okdekjariĝis S-ro Sebastià Chaler, Tarrasa, unu el la plej laboremaj hispanaj esperantistoj, kiu dum duonjarcento gvidis centojn da kursoj.

Italujo

● En la ĉiujara "Sermono de la Nacioj" en la preĝejo S. Andrea della Valle en Romo kantis en Esperanto infanĥoro, laŭ tradicio kiu komenciĝis en 1949.

Kongolando

● Okaze de kunsidoj en Léopoldville dum januaro de la Kultura kaj Eduka Komisiono de la Organizo por Unueca Afriko (OUA), kiu traktis i.a. la lingvan problemon en Afriko, aperis en du gravaj ĵurnaloj longa artikolo pri Esperanto.

Meksiko

● La 2-a Meksika Kongreso de Esperanto, fine de 1963, allogis okdekon da anoj, inter kiuj usona kaj japana. Ĝi akceptis plurajn rekomendojn por progresigo de la lingvo en Centra Ameriko.

mallongaj
novajoj

la meksika
kongresejo:
biblioteko,
Guadalajara



Sovetunio

● En Kislovodsk (Kaŭkazo) establiĝis grupo da blindaj lernantoj de Esperanto, kiuj kun helpo de duonblinduloj jam brajligis la tutan Esperanto-rusan vortaron de Dmitriev kaj la verkon de Seiho Nishi "Nia Korpo".

Urugvajo

● Fine de 1962 kaj 1963, Urugvaja Esperanto-Societo kunlaboris en disvendado de la saluto-kartoj de UNICEF (Porinfana fondaĵo de Unuigintaj Nacioj), tiel samtempe helpante al UNICEF kaj al si mem (per procenta enspezo). Imitinde.

esperanto
majo
1964



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al

Ivo Osibov, Splitskog odreda 15,

SPLIT, Jugoslavio.

ABUNDA SOMERA PROGRAMO POR JUNULARO

Laŭ informo kiu atingis la redaktoron, de la 19-a ĝis la 21-a de Junio SEJU aranĝos sian mezsomeran renkontiĝon en Sundsvall, havena urbo en meza Svedujo, 400 km norde de Stockholm. Diverslandaj gejunuloj estos bonvenaj dum tiu ĉi tradicia sveda festo.

La Bulgara Esperanto-Junularo organizos internacian seminarion pri la temo "Vojoj al internacia interkompreniĝo". La seminario okazos de la 16-a ĝis la 22-a de Julio en Primorsko ĉe la Nigra Maro en la internacia junulara tendaro, kie ĉiusemajne somerumas pli ol mil gejunuloj el ĉiuj partoj de la mondo. Tial oni planas ankaŭ publikan kunvenon pri lingvaj problemoj en la internaciaj rilatoj de la nuntempa junularo.

Informojn pli detalajn oni povas ricevi de Ingrid Carlsson, Sjuksköterskeskolan, Sundsvall 5, Svedujo, respektive de la Bulgara Esperanto-Junularo, Sofia C, p.k. 587, Bulg.

Se ni rememoras la Internacian Junularan Kongreson en Amsterdam, la aranĝon de la hungara junularo ĉe Balaton, pri kio ni jam informis, la tendarojn de DGfiJA en Germanujo, pri kio estas eble legi aliloke sur tiu ĉi paĝo kaj la vaste konatan esperantistan somerumejon en Primošten, Jugoslavio, ni konstatas ke ĉisomere la gejunuloj havos tre diversajn eblojn elekti laŭdezire medion por travivi la ferian tempon en internacia sfero.

EL LA LANDAJ SEKCIOJ

● **Francujo** — A. Leenhard (Nederlando) kaj C Mallia (Malto) gajnis librojn ĉe la konkurso de Nord-Esperanto (vidu la n-ron 698). Nova temo de la konkurso estas: "Kion vi ŝatas kaj ŝatus dum kluba kunveno?" Sendu centlinian tekston antaŭ la 1-a de Septembro al: Esperanto, 7 Rue Saint Saëns, Wattrelos, (Nord) Francujo.

● **Germanujo** — Germana Societo por Internacia Junular-Interŝanĝo (DGfiJA) estas sufiĉe granda entrepreno ĉiujare organizanta multajn vojaĝojn por la junularo. Dum somero 1963-a ĝi unuafoje aranĝis Esperanto-kursojn en la feriejo de Gilleleje en Danujo, kiuj bone sukcesis. Inter la 20-a de Junio kaj la 12-a de Septembro 1964 DGfiJA starigos E-kursojn en siaj tendaroj en Niederbreisig kaj en Nigra Arbaro. Partoprenos 120 gejunuloj danaj, francaj, anglaj, jugoslaviaj, hungaraj, svedaj, nederlandaj kaj germanaj. La gejunuloj ĉiam restos nur po 14 tagojn, tiel ke entute ĉeestos pli ol 1300 personoj! Tio estas ĝojiga sukceso kaj la frukto de la lastjara laboro de GEJ.

● **Hispanujo** — La 12-an de Januaro la Estraranoj kaj delegitoj de HEJS el Katalunujo kunvenis en la nova sidejo en Barcelono. Oni pritraktis la estontan agadon de la junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio kaj la sukcesan evoluon de la junulara movado en Hispanujo. La membraro plialtiĝis dum la pasinta jaro preskaŭ je 60%, kio permesas subteni diversajn aranĝojn, inter ili inviti 4 eksterlandajn junulojn al la 2-a Hispana Esperanto-Junulara Kongreso en Barcelono. (M. T. Magriá).

● **Hungarujo** — La ĵus fondita hungara TEJO-sekcio jam ellaboris sian laborplanon ĝis la fino de la lernojaro. La sekcio aranĝos ĉiunmonate junularajn vesperojn en Budapeŝto. La celo de tiuj ĉi aranĝoj estas konigi Esperanton al la hungara junularo kaj laŭeble plej multajn gejunulojn akiri por la movado. Dum la vesperoj okazos konkurso, kies du gajnintoj — 1 junulo kaj unu junulino — povos senpage partopreni la Internacian Junularan Esperanto-Feriosemajnon. La Feriosemajnon — antaŭvideble — partoprenos ankaŭ 20 eksterlandaj studentoj, kiuj nun lernas en nia lando. La kostojn de ilia restado prizorgos la Ministerio pri kulturaj aferoj. Ankaŭ la universitatoj eklaboris. En la Universitato "Eötvös Loránd" fondiĝis "Esperantista Studenta Rondo", kiu celas la prilaboron de la kulturaj valoroj de nia lingvo. (V. Benczik).

● **Jugoslavio** — En la tuta Jugoslavio oni povis rigardi kaj aŭskulti intervjuon pri Esperanto, kiun je la 8-a de Marto dissendis la televida stacio en Ljubljana. Svobodan Zlatnar, Estrarano de TEJO, en populara "Junulara TV-klubo" respondis demandojn pri hodiaŭa disvastigiteco de Esperanto, ĝia instruado en lernejoj kaj internaciaj junularaj esperantistaj aranĝoj. Li tuj poste turnis sin al gimnaziano Nevenka Mužič, kiu konsentis kanti konatan malnovan kanzonon en Esperanto "ĉiu, ĉiu". La prezentiĝo, kiu daŭris 5 minutojn, okazis en tre vigla maniero, kaj kio multe ĝojigas, TV-rigardantoj bele akceptis ĝin. Nevenka Mužič per sia kantado simple surprizis! En la venonta dissendo la 23-an de Marto Nevenka Mužič tralegis respondojn al pluraj rigardantoj kiuj skribis al la redakcio kaj diris mallongan mesaĝon en Esperanto.

● **Polujo** — Post la "Bluoperacio" Pola Esperanto-Junularo inaŭguris novan kampanjon — "Lazuro". Ĝi baziĝas sur la rezolucioj de UNO kaj UNESCO, kiuj pritraktis rimedojn celantajn disvastigi inter la junularo pacideojn, reciproke estimon kaj komprenemon inter la popoloj kaj rekomendas disvastigon de libera interŝanĝo de opinioj inter la diversnacia junularo, pliintensigon de klopodoj en la sfero de unuigo de edukaj celoj kun principo de toleremo, plena objektiveco kaj zorgo pri konservo de paca rilatoj inter la nacioj kaj rasoj. La Mezlerneja Fakto de PEJ (Dubois 3, Wrocław) volonte korespondus kun interesigantoj pri la koncerna problemaro.

Dum la oficiala inaŭguro ĉeestos ankoraŭ reprezentanto de grava ne-esperantista organizo: la Internacia Federacio de Organizaĵoj por Korespondado kaj Vizitoj inter Lernejanaro (F.I.O.C.E.S.), en Parizo.

Partoprenos en la programo la teatra grupo de la fama Studenta Esperanto Klubo el Zagreb, kiu jam studas ses-eran programon sub la reĝisoreco de Mladen Šerment, konata jugoslava aktoro kaj membro de I.A.T. Ankaŭ I.A.T. prizorgos oficialan teatran vesperon dum la I.J.K. Krome anoncis sian partoprenon la vaste konata kabaredo "Verda Simio" el Varsovio. Ĉu ekzistas pli bonaj rekomendoj por veni al la I.J.K.?

La Vendreda ekskurso kondukos la kongresanojn i.a. al Hiversum, la ĝardeno urbo. La urbestro de Hilversum ĵus konfirmis, ke ili

volonte akceptos la kongresanaron en sia urbdomo, kiu famiĝis kiel ekzemplo de antaŭmilita moderna arĥitekturo.

Tri firmoj regalos la kongreson: Verkade per kukoj, Knorr per duona taso da supo, kaj Hero per duona glaso da limonado. La semajna gazeto Elsevier subtenas la kongreson per preskaŭ unu kongreskotizo.

Post la I.J.K. estos ebleco "ripozi" en tre pitoreska junulara hotelo: la Drommedaris, en Enkhuizen, malnova fortikaĵo el la 14-a jarcento, nove ekipita kiel studenta hotelo fare de entuziasma grupeto de studentoj. La kultura fako de la "Drommedaris" prizorgos altnivelan artistikan ekspozicion en la junulargastejo de la 20-a I.J.K.

Ĝis la 15-a de Februaro aliĝis al la I.J.K.: 52 personoj el 15 landoj.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Boulet, S-ro J. P., Châteaumeillant, Francujo;
Durwael, S-ro I., Antwerpen, Belgujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1964

245 Banham, S-ro F. R., Victoria, Aŭstralio;
246 Kosutek, S-ro J., Sydney, Aŭstralio; 247 Degryse, S-ro André, Roeselare, Belgujo; 248 Albuquerque, D-ro José J. de, Brazilo; 249 Amorim, D-ro Nid Dutra d', Itabuna; 250 Barbosa, S-ro Ant. de Souza, Brazilo; 251 Costa Filho, S-ro Fr. Ferreira da, Rio; 252 Franco, S-ro Luiz Carlos, Recife PE; 253 Gama, S-ro Joao de Oliveira, Brazilo; 254 Pereira, S-ro Evaristo M., Brasília DF; 255 Pessoa, S-ro Floriano N. de V., Rio; 256 Atkinson, S-ro G.B., London, Britujo; 257 Hamilton, S-ro J.M., Harlow, Britujo; 258 Lewin, S-ro Maurice, Dunstable, Britujo; 259 Livett, S-ro L. G., Birstall, Britujo; 260 Rogers, S-ro F. J., Ilford, Britujo; 261 Squire, F-ino E. West Hartlepool, Brit.; 262 Lassen, S-ro Aug., Kopenhago, Danlando; 263 Schleicher, S-ro Ib., Kopenhago; 264 Schrøder, S-ro Ole, Kopenhago, Danlando; 265 Arrieu, S-ro F., Toulouse, Francujo; 266 Bodson, S-ro Claude, Caudry, Francujo; 267 Boiton, F-ino M.T., Granges les Valence; 268 Borel, S-ino, Arles, Francujo; 269 Philippe, S-ro H., Arras, Francujo; 270 Poly, S-ro P., Paris, Francujo; 271 Bechtold, S-ro Ludwig, 3568 Gladenbach; 272 Bettges, S-ro Johann, 41 Duisburg; 273 Epstein, S-ro Felix, Hamburgo, Germanujo; 274 Fritsch, D-ro Erdmann, 3394 Langelsheim; 275 Gründler, S-ro Martin, 638 Bad Homburg; 276 Jacobsthal, S-ro Alfred, 237 Rendsburg; 277 Raab, S-ro Johann M., 85 Nürnberg; 278 Reinelt, D-ro Josef, Bonn, Germanujo; 279 Treude, D-ro Wilhelm, 8 München; 280 Wolff, S-ro Johann, 5 Köln, Germanujo; 281 Wuenschel, S-ro Hans Ph., 8 München; 282 Campetti, Prof. D-ro Gaetano, Italujo; 283 Nurra, S-ro Gavino, Carbonia, Italujo; 284 Pacelli, Prof. Giuseppe, Pisa; 285 Viti, S-ro Giulio, Roma, Italujo; 286 Jerkovic, Ing. Bogdan, Beograd; 287 Gomez, F-ino An-

gèle, Meknes, Maroko; 288 Smits, S-ro H., Den Helder, Nederlando; 290 Sunde, S-ro P., Oratia, Nov-Zelando; 291 Armanis, S-ro Andrejs, Lier, Norvegujo; 292 Ringstad, S-ro G., Torp, Norvegujo; 293 Sergejew, S-ro Ivan V., Moskva, USSR.; 294 EK, S-ro Axel, Hässleholm, Svedujo; 295 Kjellgren, F-ino Jenny, Murjek, Svedujo; 296 Lindberg, S-ro Torsten, Svedujo; 297 Ljungberg, F-ino Astrid, Stockholm; 298 Ohlsson, S-ro Carl, Stockholm, Svedujo; 299 Pålsson, S-ro Herluw, Hässleholm; 300 Söderberg, S-ro K., Upsala, Svedujo; 301 Chobanoff, D-ro Stefan, Lanham, Usono; 302 Doneis, S-ro A. M., Pharr, Texas; 303 Doneis, S-ino Mary, Pharr, Texas; 304 Schackmann, S-ro J. H. Cincinatti, Usono.

DONACOJ GENERALA KASO

Davies, S-ro H., Manchester: 30,— gld.
Baksik, S-ro Henriko, München: 5,58 gld.
Michalik, S-ro F., Hösel, Germ.: 5,40 gld.
Beckford, S-ro Colin, Sudafriko: 1,— gld.
Olsson, S-ino Agda, Göteborg, 347,25 gld.

El letero de nia individua membro S-ino Agda Olsson: "... mi promesis ... sendi monon por la ĝenerala kaso ... Mi plenumis mian promeson kaj mi per poŝtgira konto sendis 500,— svedajn kronojn. Koran dankon pro via fruktodona laboro kaj bonan sukceson en via daŭra laboro." Varman dankon ni esprimas pro ĉi tiu bela gesto. Se nur unu elcento de nia individua membraro imitus ĉi tiun ekzemplon, kian firman apogon la Asocio sentus en la dorso okaze de ĉiam aperantaj neatenditaj elspezoj...!

FONDAJO DOMO

Heilberg, S-ro L., Kalif., Usono: 50,— gld.
Braun, Gisela, Frankfurt/Main: 9,90 gld.

FONDAJO CANUTO

Vilkki, S-ro J., Finnlando: 1 MA
Koivu, F-ino Sirkku, Finnlando: 1 MA
Ytongb. Esperanto-Soc., Svedujo: 2 MA
Esperanto-Grupo de Torino: 8 MA



oficiala
informilo
n-ro 368
1 apr. 1964

DONACOJ INTERNACIA ARTA TEATRO

Boffejon, S-ro Hector, Belgujo: 36,50 gld.
Vincent, S-ino Jeannine, Francujo: 7,30 gld.
Figliera, S-ro G. C., Bruselo: 90,— gld.
S-ro Bonnoma: 30,— gld.

FONDAJO AZIO-AFRIKO (antaŭe APO)

Wesser, S-ro Alex, Newark, Usono: 11,46 gld.
Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro
ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

letero

POR PLENIGI LA CANUTO-KASON

UEA nun havas pli ol 500 Dumvivajn Mem-
brojn. Ili do ne plu pagas la kotizon al UEA,
sed havos grandan profiton. Se almenaŭ 400
DM-oj pagos libervole, 2,50 gld. jare (10 ste-
lojn) — negranda sumo en ĉi tiu tempo —
la Canuto-fondaĵo povos helpi almenaŭ 50
esperantistojn en la nepagantaj landoj. Mi
volonte pagos kiel n-ro 1.

L. J. Wulfers, Dumviva Membro

*Eventualajn pagojn laŭ la supra propono ni
kompreneble kvitancos sub la titolo "Fon-
daĵo Canuto" en la Oficiala Informilo.*

LA POSTMARKKOLEKTADO

Partoprenontoj en la Esperanto-Kongreso en
Hago estas urĝe petataj kunporti el propra
lando valorajn uzitajn poŝtmarkojn por trans-
dono dum la Kongreso al S-ro P. Zacho, el
Kopenhago, favore al UEA.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1964

stato je la 31-a de marto

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Britujo	6691	5120	76,52
2. Francujo	7752	5826	75,15
3. Hispanujo	2660	1925	72,37
4. Svedujo	7180	4810	66,99
5. Nederlando	5975	3825	64,02
6. Finnlando	3160	1900	60,13
7. Brazilo	3694	2179	58,99
8. Svislando	2459	1425	57,95
9. Usono	4526	2580	57,—
10. Belgujo	2055	1170	56,93
11. Danlando	3099	1635	52,76
12. Italujo	4210	2160	51,31
13. Norvegujo	1755	845	48,15
14. Japanujo	3690	1715	46,48
15. Germanujo	7141	3265	45,72
16. Jugoslavio	5375	1255	23,35

KONKURSO II

1. Aŭstralio	1475	1093	74,10
2. Portugalujo	485	315	64,95
3. Kanado	842	500	59,38
4. Aŭstrujo	1430	825	57,69
5. Madagaskaro	250	135	54,—
6. Islando	250	135	54,—
7. Nov-Zelando	1481	685	46,25
8. Israelo	460	195	42,39
9. Sudafriko	250	100	40,—
10. Urugvajo	250	75	30,—
11. Argentino	810	200	24,69

Vidu la regulojn sur paĝo 38.

ANONCETOJ

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn,
ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por
lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de
UEA adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins,
Clermont-Fd. (PdD) Francujo) kiu peras adre-
sojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Informojn pri la katolika religio oni povas
senpage ricevi de la Internacia Katolika In-
formejo, Sekretariejo: Gasthuisring 54, Til-
burg, Nederlando.

S-ro E. L. M. Wensing, vicprezidanto de
UEA, estas en vojaĝo dum aprilo kaj majo kaj
tial ne povas dum tiu tempo respondi al
leteroj.

Letervespero 24.6.1964 aranĝota okaze de
kursfino (16—60 jaraj). Respondo garantiita.
Afable skribu amase. Montreala Esperanto-
Klubo, F. Paul Durette, 8050 Notre-Dame Est,
Montreal 5, Qué. Kanado.

Internacia mondregno kreiganta. Tiu libro
estas pritrakto de la nuntempaj kaj estontaj
socialaj cirkonstancoj por homoj kaj nacioj.
(85 paĝoj. Formato 13 × 19 cm. Fortika kaj
bela blanka tolkovrilo kun ora surpriso.
Prezo 6,50 d.kr.) Petu senpagan ilustritan
faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Marien-
dalsvej 94—96, Kopenhago F., Danlando.

Deziras profesian interŝanĝon de ideoj,
gazetoj kaj aliaj literaturaĵoj pri industria
sekureco, kontrolado kaj evitado de akcidentoj,
fajroj, ktp. Gyula Kayáry, Inĝeniero Industria,
Apartado 2679, Mexico City.

Amikeca Vojaĝa Agado, Chasséstr. 23, den
Haag, Nederlando, ebligas senpage partopreni
Universalan Kongreson. Petu informojn.

Sperta Esperantistino petas invitojn de or-
ganizaĵoj/familioj por instruado aŭ praktiko
de nia lingvo. S-ino M. C. Major, 1 Pem-
bridge Square, London W. 2. Britujo.

23-jara latva studento deziras korespondi
kun esperantist(-in)oj el Okcidenta Eŭropo
pri literaturo, muziko, mebloproduktado, spor-
to. Kolektas esperantaĵojn kaj dancmuzikno-
tojn. Julio Aris Smildzinš, str. Daliju 14, Riga
2, Latvio, USSR.

Mi deziras interŝanĝi jubileajn kaj memo-
rigajn poŝtmarkojn kun filatelitoj de okci-
denta Eŭropo. S-ro Martin Wärnö, Box 16,
Valla, Svedujo.

2 skotaj universitatanoj volas labori/plibonigi
la francan en francparolanta lando dum unu
jaro ek de oktobro 1964. Akceptos ion ajn, por
unu aŭ du. D. Kelso, University Union, Park
Place, Edinburgh 8, Skotlando.

Mi deziras aĉeti la verkon de Miller zu
Aichholz: Die Österreichischen Münzprägung-
gen. Bonvolu fari oferton. J. Moll, Begijne-
kade 2, Utrecht, Nederlando.

Interesas recepto por fabriki "Halva" (mezo-
rienta dolĉaĵo). Nepre respondos sendonte
poŝtmarkojn kaj donaceton: Apartado 11661,
Mexico 11, Meksiko.

Ni deziras turismajn kaj aliajn esperanta-
ĵojn por ekspozicio dum la Kanada Kongreso
de Esperanto, 26-6-1964. Adreso: 68 McNaugh-
ton Avenue, Ottawa 1, Kanado.

William Shakespeare

estis angle



sed eĉ la angloj ne legas facile la lingvon de Shakespeare. La versaj tradukoj de Auld kaj Rossetti en la "Angla Antologio"* malkovros por via ĝuo la kvaliton de liaj dramoj kaj poemoj.

* 10,— gld. (40 stelojn), mendebla ĉe UEA; 319 p., forte tolbindita; ok jarcentoj da prozo kaj poezio anglaj. Trafa elekto, brilaj tradukoj.

**Kontakto
Harari
Kralj
Miner
Broadribb
Tyson
Lasky**


junulara
gazeto

printempo 1964

jarabono 8 gld.

**Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2**

ORIENTO KAJ OKCIDENTO



de
**Georges
Fradier**

**Eldonis
UEA
kun
helpo
de
Unesko**

1,50 gld
(6 st.)
50 paĝoj

*Ilustraĵo el "Oriento kaj Okcidento"
(Foto: UNESCO - Marc Riboud).*

Abonu la monde konatan bildrevuon

la Praktiko

"la gazeto, kiu instruas kaj amuzas"

— alloga aranĝo, ilustritaj artikoloj pri ĝeneralaj temoj, tre taŭga legaĵo por komencantoj kaj progresantoj.
Abonigu viajn kursanojn!

Nun akurate aperanta ĉiumonate

Redaktas: S-ino E. Burgler-Jeszö

Eldonas UEA

Abonprezo 1964: 8,— gld. (32 st.) Pagojn akceptas la kutimaj perantoj de UEA kaj UL.



H. C. ANDERSEN

FABELOJ

(IV-a volumo)

tradukis D-ro L. L. Zamenhof

53 originalaj desegnaĵoj de

A. Uniechowski

244 paĝoj

dukolora polvokovrilo

Prezo: 3 us. dol. (40 steloj)

(+ 10% por la sendkostoj)

Eldonis:

Heroldo de Esperanto - Bruselo

Mendu ĉe la eldoninto aŭ ĉe

UEA

Helsingör

invitas vin pasigi ferian semajnon en La internacia Altlernejo 19.—26. julio inter samideanoj el multaj diversaj landoj. Petu senpagan prospekton ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Åbyhøj, Danlando

La NOV-ZELANDO ĈAMBRO ĉe UEA
estas jam finpagita !

Varman dankon al la Nov-Zelanda
Esperanto-Asocio.

Partoprenu en la
BELARTAJ KONKURSOJ
kun novaj altaj premioj !
Limdato: 31 majo 1964.
Sekretario: S-ro E. P. Ockey,
15 Upper Pines, Woodmansterne,
Banstead, Surrey, Anglujo.

Bone memoru, ke....
La ESPERANTISTA KULTURDOMO
Kastelo Grésillon

BAUGE

M. & L. Francujo

Dum la tuta somero, metas je via dispono
siajn pli kaj pli taŭgajn arangojn, materialojn
intelektajn, distremajn.

Petu informojn. Vidu la programojn.
Rapide aliĝu.

Amikeca vojaĝa agado

Chasséstr. 23, Hago, Nederlando

ebligas vin inviti vian amikon el malriĉa
lando *senpage* ĉeesti la Univ. Kongreson.

Petu informojn !!!

Abonu ĉinan Esperantan periodaĵon

EL POPOLA ĈINIO

aperanta dumonate en 40-paĝa kajero (19 × 26 cm) riĉe ilustrita kun multkoloraj kovrilo kaj bildopaĝoj

ĜI INFORMAS VIN

pri la konstruado, popola vivo, kulturo, arto, literaturo kaj fundamentaj scioj de Ĉinio; kaj problemoj kaj novaĵoj pri Esperanta movado

En 1964 aldoniĝas sinsekve novaj rubrikoj: **Filatelio Folio** (multkolora presita); **Post la Kurso** (por komencantoj) kaj **Distra Angulo** (por vesperoj de Esp.-grupoj)

DONACAĴOJ

Du kompletajn seriojn da belaj ĉinaj poŝtmarkoj ricevos la abonantoj, pagintaj antaŭ 30 junio, 1964.

"Ĉielpaca Pordego de Pekino" — brokatan bildon (formato: 26.5 × 17.5 cm) ricevos tiuj, kiuj varbis pli ol du novajn abonantojn antaŭ 30 junio, 1964. (Tiuj, kiuj sukcesis varbi pli ol 5 novajn abonantojn, ricevos samtempe unu ekz. de "El Ĉina Pentarto".

ABONTARIFO:


Landoj	Monoj	Por 1-jaro	Por 2-jaroj	Por 3-jaroj
Aŭstralio	A. £	0-5-0	0-7-6	0-10-0
Brazilo	Cr. \$	225.00	340.00	450.00
Britujo	£	0-5-0	0-7-6	0-10-0
Francujo	NF	3.00	4.50	6.00
Okc. Germanio	DM	3.00	4.50	6.00
Hispanio	pes.	42.00	63.00	84.00
Italio	Lir.	500	750	1000
Japanio	Yen	160	240	320
Jugoslavio	din.	750	1125	1500
Nederlando	gld.	2.50	3.80	5.00
Portugalio	esk.	16	24	32
Svedujo	S.kr.	3.50	5.30	7.00
Usono	US \$	1.00	1.50	2.00

(abonprezoj por aliaj landoj informiĝu ĉe libroservo de ĈEL)

Abonu ĉe: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, aŭ ĝiaj diverslandaj perantoj aŭ ĉef-delegitoj, aŭ rekte ĉe:

Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 313, Peking, Ĉinio.

Al petantoj Libro-servo de ĈEL liveras senpagajn specimenojn de "EL Popola Ĉinio" kaj katalogon de ĉinaj Esperantaj libroj



Parto de la surfaco de ĉelo de la
intesta kanalo de ringvermo, elek-
tronoptike pligrandigita 17.500-oble.

Ĉu vi Sentas vin Konkeranto de la Mondo ?

Antaŭ ne tre longa tempo, la vivoŝancoj de novnaskita bebo estis malpli ol kvindek procentoj; atako de apendicito preskaŭ ne lasis ian ŝancon de postvivo; kaj tiujn, kiuj postvivis tiajn riskojn, ofte ekstermis plagoj kaj pesto. Hodiaŭ oni miras pri tio, ĉar la publika sano atingis tre altgradan staton. Ni ĝoju ke ni vivas en la nuntempo, tiom pli komforta.

Tamen, eĉ nuntempe, malsano trafas multajn je tiu aŭ alia tempo. Sed, ĝi trafas nin malpli ofte.... malpli grave.... malpli dolorige, ĉiujare malpli - dank' al konstanta disvolvo de novaj

aparatoj por diagnozo kaj terapio. Aparatoj kiel la elektron-mikroskopo de Philips, kies pligrandiga kapablo ĝis 200.000 diametroj povas vidigi virusojn neniam antaŭe viditajn nek konitajn; aŭ kiel la X-radia bildamplifilo de Philips, kiu ebligas al kuracisto fari kinematografian filmon de batanta koro.

Do, se vi sentas vin en perfekta sano kaj konkeranto de la mondo, estas tre verŝajne ke iel Philips helpis vin.

PHILIPS

Elektronika Ekipaĵo